

Laŭte!

Supplément au n°134
Suplemento de n°134
Marto 1998


Esperanto, FR-47470 Beauville. Abono: 80 FRF

ISSN 0150 5823

CPPAP n° 58651

KAZIMIERZ SZCZUREK

RAKONTOJ ĈE KANDELA FLAMO



Eldonis: **Laŭte!** - gazeto de Amika Esperanto-Rondo


FR-47470 Beauville

La kovrilpaĝon projektis: Beata Kosmala-Sĉurek

La kopirajto: ĉe la aŭtoro kaj la eldoninto

KAZIMIERZ SZCZUREK

RAKONTOJ
ĈE KANDELA FLAMO



Beauville

Enkonduke

Sur breto de mia laborĉambro, en latuna kandelingo, staras kandelo. Ĝi staras tie jam delonge, sed antaŭe mi ne uzadis ĝin, kaj ĝi rolis nur kiel simpla dekoraciaĵo, unu el similaj objektoj troviĝantaj en la ĉambro, sen klare difinita bezono.

Sed fojan vesperon de la 1980-a jaro mi atendis venon de la itala verkistino Lina Gabrielli, mia kunulino en la baldaŭ aperonta poezia volumo *Nuancoj*. Atendis ankaŭ ŝia ĉambreto por dormi, mia laborejo bone hejtata, tri oportunaj apogseĝoj kaj vespermanĝo por kiu mia edzino estis preparanta la lastajn detalojn. Mi sidis kaj legis ion.

Kaj jen tiun etoson de trankvila atendado abrupte tranĉis kvazaŭ akra siblo: io paneis en la elektrejo, kaj estingiĝis la elektra lumo.

- Mil diablojn! - mi sakris - ĝuste nun, kiam... Kion faras tiuj sentaŭguloj tie? Ili dormas anstataŭ gardi!

Mi staris en mallumo, en stato inter sakrado kaj senpova ploro, ne sciante kion fari, sed jen fulma penso trakuris mian kapon: la kandelo, mi ja havas la kandelon! Mi lumigu ĝin, ke ĝi fine faru ion utilan.

Palpe mi trovis alumetojn sur la breto, ekbruligis unu, per ĝi la kandelon, kaj dum kreskantis la flameto mi ĉirkaŭrigardis en la ĉambro. Kaj - strange - ĝi montriĝis al mi tute nova, iel mistere ombroza. Mi sidigis sur apogseĝo, ankoraŭ sen konkretaj pensoj, sed jen denove mian rigardon altiris la kandela flamo. Mi spektis ĝin pli longe, atente, kaj la okuloj jam ne emis deturni sin. La flameto palpebrumis, jen flirtis kokete, jen senmovis rekte, simulante indiferecon, ŝanĝadis la nuancojn, la formojn, jen kaj jen kraketis delikate, kvazaŭ volante alparoli min, kaj eksilentis denove, ne jam kuraĝante amindumi kun mi sed videble volante tion. Tiam mi alridetis ĝin kuraĝige kaj atende, kiel junulo deziranta ekaŭdi la sopiratan konfeson de sia hontema knabino. Kaj al mi alfluetis ĝia subtila flustro:

- Aŭskultu! Mi ne estas nur pigrulino staranta senutile sur breto, mi estas animeto de via hejmo. Mi vivas ne por mi mem, sed por aliaj. Ankaŭ al vi mi deziras servi sed vi preteratentas min. Rimarku de tempo al tempo, ke mi ekzistas. Se vi estas sola, se meditemo vagas en via kapo, lumigu min kaj sidiĝu apude. Kiam ekflagros mia delikata flameto kaj la silenta soleco montros al vi sian saĝon, nekoneblan al bruemuloj, eble en via menso ekĝermos la mirinda floro de l'in-spiro.

Aŭ kiam vizitos vin ŝatata amiko kaj vi babilos vespere, lumigu min. En duonombro mi pli kuraĝos subflustri al vi aferojn interesajn, eventojn rememorindajn; traktu ankaŭ min amike, kaj mi recipokos per fideleco.

En tiu vespero naskiĝis nia intima amikeco. La kandelo ne plu staras estingite sur la breto, kiel morta peco de vakso, sed flagrante akompanas miajn meditojn aŭ miajn interparolojn. Precipe dum mornaj aŭtunaj vesperoj kiam trans la fenestroj hurlas vento kaj densaj pluvogutoj ŝutiĝas je la vitroj, kvazaŭ semata sablo, aŭ vintre kiam ĉio dronis en profunda neĝo kaj la steloj sparkas pale en frosta spaco, se vizitas min iu amiko kaj ni sidas oportune en apogseĝoj, absorbataj per interesa babilado, la kandela flamo palpebrumas al ni el sia kandelingo, kontenta ke ankaŭ ĝi apartenas al la intima kompanio.

Kaj ĝuste el tiuj diskutoj, babiladoj kaj rememoroj elkreskis la sekvantaj rakontoj.

"Fortuna variabilis"

Pola anekdoto rakontas, ke, en la deksepa jarcento, dum la sveda invado en Pollando, la krakova kanoniko Simeono Starovolski akompanis la svedan reĝon vizitantan la krakovan reĝan kastelon. Kiam dum interparolo la reĝo deklaris, ke... "la pola reĝo neniam plu revenos al ĉi tiu loko", Starovolski diris trankvile: *fortuna variabilis, deus mirabilis!* *

Mi konsideras ĉi tiun veron, estante turiste en Ĉeĥoslovakio en la loko kie mi iam, dum la milito, laboris kiel deviga laboristo de la germana *Arbeitsamt*.**

Antaŭ la dua mondmilito en la grandega entrepreno laboris lokaj laboristoj, sed la germanaj invadintoj, elektintaj multajn virojn por militservo kaj senĉese minacataj de la aliancanoj, perforte sendis tien laborantojn el la konkeritaj landoj: polojn, rusojn, francojn, ĉeĥojn ktp. Fine venis ankaŭ militkaptitoj. Ĉirkaŭ la granda metalurgia komplekso elkreskis amaso da barakoj loĝataj de gelaborantoj kaj, apartigitaj per bariloj el pikildrato, de militkaptitoj.

Kompreneble, aperis ankaŭ multe pli da gardistoj kaj policanoj; granda parto da ili estis sadistoj, turmentantaj la kaptitojn, kiuj similis pli al aro de fantomoj ol al vivaj estaĵoj. Vidante tion de tempo al tempo, mi sentis la abomenan guston de senpovo.

Precipe unu el la gardistoj restis klare en mia memoro. Foje post finita laboro ni iris revene laŭ la fandeja irejo al la pordego. Ne eblis rapidi ĉar antaŭ ni la tutan irejon okupis taĉmento de kaptitoj, trenantaj sin lace kaj apatie al la barakoj, akompanate de du gardistoj. Somere sed en manteloj kaj vintraj ĉapoj surkape - tiel oni kaptis ilin ĉe la fronto - ili prezentis bildon vekantan sinceran kompaton.

Atinginte la ŝtuparon, la taĉmento eklantis kaj brue as-

* fortuna estas ŝanĝiĝema, Dio kompatema.

** (germ.) : laboroficejo.

cendis klakante per la lignaj ŝuoj. Sed subite io tumultis, aŭdiĝis krio vira, poste virina kaj tuj sekvis rabia kriego akompanata de krakaj batoj. Ŝokataj, ni rigardis teruran scenon: unu el la gardistoj per derompita peco de tabulo batis, renversitan teren, militkaptiton. Tuj apude, de sur la tero penis leviĝi juna, ĉifone vestita virino. Ni baldaŭ komprenis kio okazis. Unu el la rusaj laboristinoj, perforte senditaj el la konkeritaj partoj de Rusio al Germanio, rimarkinte taĉmenton de rusaj soldatoj, elprenis magran panpecon, eble ankaŭ ricevitan donace, kaj metis ĝin sur ŝtupon. Unu el la kaptitoj tuj prenis kaj enŝovis ĝin en poŝon. Ĉio daŭris ne pli ol kelkajn sekundojn sed unu el la gardistoj rimarkis tion kaj eksaltis kiel pikita tigro. Per kelkaj saltoj li atingis la rusan knabinon, puŝege renversis ŝin teren kaj piedbatis kelkfoje. Poste kvazaŭ akcipitro li ĵetis sin al la mizera kaptito, per la pugnoj batis lin longan momenton sed tio ne kontentigis lian sadismon, ĉar li lasis lin, per fulmrapida salto sur tabulstokon derompis eron da tabulo kaj per ĝi denove ekbatadis sian viktimon. Post kelkaj batoj la kaptito falis teren kaj restis senmova, nur konvulsioj de lia korpo atestis, ke li vivas. De tiam la kruelulo lasis la viron kaj kolera revenis post la taĉmenton. El oreloj de la turmentita homo fluetis sango, makulante liajn vangojn, la neglektitan barbhararon kaj la malpuran veston.

Ni staris silente, deprimitaj, kuraĝantaj neniel oponi kontraŭ la kruelaĵo. La timo, fontanta el kono de la hitlerismo, mortigis en ni ĉiun devon de kontraŭstaro. De kiam la lasta kaptito malaperis en la pordego, ni kuraĝis ekascendi. De sur la ŝtuparo mi vidis la forkurintan areton de Rusinoj. Ili staris ĉe muro kaj ploris.

Amaraj sentoj akompanis min hejmen. Ekde la infanaĝo oni edukis min en amo al la proksimulo, kaj la pano estis preskaŭ sanktaĵo. La patrino, antaŭ ol ektranĉi novan panon, per tranĉilo signis super ĝi krucon, kaj se ĝi hazarde falis planken, ŝi levis kaj kisis ĝin. Neniam licis rifuzi panon al almozulo, ĉar ja... "kion vi faris al iu el tiuj malriĉuloj, tion vi faris al mi mem" ! Kaj jen!

Sed la intensa vivo de tiu tempo ne permesis, ke la pensoj longe restadu ĉe unu afero. Estis ja la lastaj monatoj de la "miljara" regno. La aliancanaj armeoj premis de ambaŭ flankoj la germanajn taĉmentojn, nun forlasantaj senĉese pli kaj pli novajn regionojn de la konkeritaj landoj. La gvidantoj de Germanio, jam flarantaj sian finon, ekspluatis ĝis ekstremo la ankoraŭ funkciajn produktaĵojn. Neniama grandega fandejo laboris kun tiel enorma streĉo. La inĝenieroj preskaŭ ne sidis en siaj oficejoj sed senĉese inspektis la produktadon, iam-tiam eĉ mem helpis ĉe la fornoj kaj senĉese instigis al pli rapida fando, strebante tiamaniere ne perdi favoron de siaj estroj kaj eviti soldatigon.

La ĝisejo, en kiu mi laboris, ricevis novan ĉefon. Badoux, ĉirkaŭ kvindekjara, grasa viro, partiano sendita al la nova posteno por elpreni el la entrepreno maksimumon, pli taŭgis esti komandanto de koncentrejo ol estro de fabriko.

Ĉiumatene, venante al la laboro, li paŝis kvazaŭ indiferece tra la halo, sed je kelkaj paŝoj per nervoza, rapida movo li turnadis sian penetran rigardon jen dekstren, jen maldekstren; ve al la viktimo! Laboristoj, rimarkinte lin, ŝajnis duobli sian streĉon kaj se iu hazarde ne estis laboranta, tiu fulmrapide kaptis iun ajn ilon kaj ekviglis ŝvitige.

Badoux havis strangan kutimon ofte palpi per la dekstra mano ĉe la ingveno. Oni kaŝe ridetis, ke li verŝajne restadis inter ŝtelistoj kaj palpas sian monujon, sed baldaŭ montriĝis, ke la supozo ne estis ĝusta. Kiam de tempo al tempo li aperis en la SA-uniformo, li portis ĉezone revolveron kaj ĝuste ĝin li tiel kontrolis per la mano. Kiaj cirkonstancoj trudis al li tian kutimon, neniu sciis, kvankam diversaj estis la konjektoj.

Baldaŭ la nova ĉefo kreis en la entrepreno teruran etoson. La laboristaro ŝvitis, homoj timis interrompi eĉ por momento la laboron kaj eĉ la alportitan nutraĵon ili manĝis ie en angulo. Timis sed samtempe malamis lin la inĝenieroj, kiujn li traktis kiel servutulojn. Foje mi vidis kiel Badoux kaptis inĝenieron ĉe kravato, taŭzis lin, retropaŝante, kaj insultis, kaj la inĝeniero - viro pli ol kvindekjara - ne kuraĝis kontraŭstari. Oni konis la reĝimon.

Sed la tempo fluis kaj ĉiu tago ŝanĝis la militan situacion en Eŭropo. La frontlinio senĉese proksimiĝadis, ĝis fine alfluadis el oriento mallaŭta, poste pli kaj pli forta tondrado de kanonoj, similigante la lokajn praktikantojn de la hitlera ideologio je ratoj sur dronanta ŝipo. En la fandejo daŭris laboro sed la laboristoj preskaŭ ne interparolis, kvankam febliĝis la inspektado. La ekstreme streĉa etoso de la lastaj tagoj de l'milito silentemigis ĉies buŝon, nur la okuloj de tempo al tempo montris ekbrilojn - ĉe unuj de timo, ĉe aliaj de ĝojo.

Dum frua mateno en unu el tiuj tagoj mi iris lante al la laboro. La tago aperis nebula, senĝoja kaj - same kiel la antaŭaj - plena de atendado. La eksterurba ŝoseo, kondukanta al la stacidomo, estis senhoma, nur malofte aperis solulo simila al mi, iranta labori.

Sed jen alflugis el la nebulo brueto de radoj kaj baldaŭ aperis veturileto plena de diversaj pakaĵoj kaj ĉe ĝi du homoj. Unu, tenante per la dekstra mano la timonon, tiris la veturilon per zono ĉirkaŭŝultre; la dua iris malrapide, iome puŝante la veturilon. Mi rigardis sen scivolo, supozante ke malriĉuloj transportas sian havaĵon, sed kiam la viroj veturis preter mi, mi ekrigardis pli atente kaj... ekkonis ambaŭ. Post la veturilo paŝis Badoux. Ne plu en uniformo nek en kutime eleganta vesto, sed en sporta bluzo, tolaj pantalonoj kaj pezaj sportŝuoj. Por longa vojaĝo.

Sed pli surprizis min la dua viro. Lia ruĝa vizaĝo ŝvitis, la haroj estis humidaj kaj taŭzitaĵ. Civila pantalono, videble malnova kaj nesufiĉe longa, ne volis kovri la soldatajn ŝuojn. Mi nur unufoje vidis tiun viron sed mi tuj rekonis lin! Estis la gardisto, kiu tiel kruele turmentis la kaptiton akceptintan panpecon de rusa knabino.

Kia ludo de l'sorto! Ĉu pri tia triumfo ili revis iam, deklarante aliĝon al la hitleranaro? Kie estas la "miljara regno", la lando de l'feliĉo, tiel ofte promesata al ili de *Führer*? Konstruaĵo farita el maljusto, perforto, teroro kaj krimo kolapsis, postlasinte al la konstruintoj nur bestan timon kaj abomenan konscion pri venanta tempo de l'juĝo. Renkonte al ĝi necesis nun pilgrimi per malriĉula veturileto. ■

POMĈAMPANOJ

Lucjan Birecki pene puŝis la preĝejan pordegon, lasis la edzinon eliri kaj mem eliris post ŝi. Ĉirkaŭblovis ilin akra, frosta vento, intermite levanta neĝajn kirlaĵojn. Ili levis la peltajn kolumojn, Birecki prenis la edzinon je brako kaj direktis ŝin maldekstren.

- Ni ne iru tien - per kapmovo li montris al la plej trafikplena strato - ĉiam iu vagaĉas tie kaj divenos, ke ni estis en preĝejo.

Ili trairis du senhomajn stratetojn kaj tra malnovaj arkaĉoj direktiĝis hejmen.

Sub la vasta arkadaro svarmis homoj - parto babilis en grupetoj, kelkaj promenis tien kaj reen, aliaj rigardis montrofenestrojn. Zumis interparoloj. Birecki kun la edzino paŝis laŭlonge, de tempo al tempo salutante iun aŭ reciprokante salutojn. Ĉe fino de la arkadaro la edzino tuŝis lin je la maniko.

- Luĉjo, vidu!

En kafeja fenestro buntis granda, mane pentrita afiŝo:

La 20-an de februaro

"GASTRONOMIO"

arangĝas por siaj klientoj

tradician

KARNAVALAN BALON

Ludos du orkestroj (unu el Ĉeĥoslovakio)

La amuzon agrabligos konataj artistoj!

"Meksika ĉambro"! En la kelĉambro "Infero"!

Multaj surprizoj! Enirprezo: 100 zl.

La lokojn oni povas mendi anticipe!

Ili haltis por momento, poste iris pluen sed Birecka farigis pli parolema, la afiŝo vigligis ŝin interne.

- Solicka jam havas la robon preta! - ŝi diris. - Nigran, silkan!

- Jes? - neglekte diris Birecki. - Ŝi certe denove prezentos duonon de l'postaĵo!

- Luĉjo!

- Nu, nu, mi bone memoras la pasintajn jarojn!

- Do, en kia vesto ŝi iru al balo, en mantelo?

Birecki ne respondis. Kelkan tempon ili iris senparole, poste ŝi komencis:

- Vi ne ŝatas ŝin.

- Mi ne kapablas toleri tiun virinaĉon!

- Senkaŭze.

- Eble.

- Cetere, ni ne devas amuziĝi kun ŝi, estas ja...

- Ĉu vi interkonsentis pri komuna amuzo? - Birecki interrompis nerveze.

- Nee... - ŝi diris necerte - sed ni ja devas iri kun iu. Ĉu vi volas ke ni iru solaj?

Birecki respondis post kelka tempo:

- Se vi volas, ni povas iri kun gesinjoroj Ŝeliga.

- Ĉu vi parolis kun ili pri tio?

- Li alparolis min.

- Ĉu li proponis ke ni iru kune?

- Jes, li pretas klopodi pri aparta tablo. Nu? - li ĵetis demande, kiam la edzino silentis.

- Se vi volas...

- Mi ankoraŭ ne respondis ĉar mi volis interkonsenti tion kun vi.

- Ni povas iri, mi pensas.

- Bone. Mi telefonos al li morgaŭ. - Birecki ekridetis kaj post momento aldonis - Nu, mi esperas iome ekfuriozi!

Ankaŭ Birecka ekridetis, kontenta ke la afero bone evoluas. Ŝi jam longe preparadis sin por tiu amuzo, sekrete dezirante ekbrili per sia nova robo, tamen ŝi iome ĝenis sin malkaŝi tion al la edzo; estontaj sukcesoj neniam estas certaj. Ili paŝis lante, nemulte parolante, ĉiun okupis propraj pensoj, ne ĉiam konfeseblaj al la alia. Sekretaj esperetoj aperadis efemere en la menso kaj, incitante la sensojn, forflugadis, anstataŭitaj per aliaj.

Post la hejmenveno la afero estis iom forgesita, tamen vespere, dum Birecki en la kuirejo babilis kun siaj patrino

kaj infanoj, Birecka prenis el ŝranko la novan, longan robon, rigardis ĝin longe, prove alpingladis broĉojn kaj trarigardis kolierojn.

El la longa vico de grandaj fenestroj de "Grand-Hotelo" radiis forta lumo, forpelante ombrojn de sur kontraŭaj muroj. Hazardaj preterpasantoj turnadis la vizaĝojn al la fenestroj, tamen flavaj duonkurtenoj permesis vidi nur blankajn plafonojn kaj sub ili la pendantajn krepzonojn kaj vatviletojn, kies celo estis imiti neĝerojn. Tra unuopaj fenestrovitroj alfluadis obtuzaj tonoj de muziko.

Ala Birecka butonumis sian pelton, levis la kolumon, per la cetera mano levetis la trenaĵon de sia longa robo, kaj supreniris la ŝtuparon.

La vestejo estis plena, precipe dense staris homoj ĉe la kroĉilaro. Unuj transdonadis super la tablo mantelojn al la vestejisto, aliaj estis demetantaj ilin. Flanke, antaŭ grandaj speguloj staris virinoj kombante la harojn aŭ ordigante la robojn. De tempo al tempo la ejon trakuris kelnero, kies blankaj ĉemizo kaj redingoto ŝajnis makulitaj per nigra papilio.

Birecki prenis de la edzino ŝian pelton kaj aliris la vicon apud la vesteja tablo, ŝi turnis sin al spegulo kaj, elpreninte pudrujon, per la lanugo tuŝis kelkfoje la vizaĝon. Dum ŝi staris ĉe spegulo, atingis ŝin ekkrieto:

- Nu, fine, fine! Ni jam pensis ke vi ne venos! Mi salutas! - Ĉirkaŭ kvindekjara, graseta, nigre vestita sinjoro Ŝeliga aliris ŝin rapide kaj dufoje kisis je l'mano. - Ni jam maltrankvilis pri vi. Sed kie la edzo?

Birecka ŝvingis permane al la kroĉilaro - Jen li batalas! Ŝeliga lasis ŝin kaj alkuretis Bireckin, kiun ĝis nun li ne rimarkis enmiksitan inter viroj premiĝantaj al la vestejtablo:

- Saluton, Luĉjo! Nu, fine vi venis! Ni maltrankvilis ke eble io okazis. Ni tenas por vi lokojn. Vi vidis, kio fariĝos pli poste! Jam nun oni preskaŭ batalas pri liberaj seĝoj. Maha flugas kiel frenezulo, por starigi aldonajn tablojn kie nur eblas.

- Ĉu estas iuj konatoj?

- Nu, ne eta kompanio. Kaj virinoj! - Ŝeliga kelkfoje ŝmascis kaj palpebrumis. Poste li revenis al Birecka, kune ili atendis ĝis Birecki venis kaj triope ili direktiĝis al la salonego.

La orkestro ĉesis ludi. Birecka, akompanata de ambaŭ viroj, tra malplena pargeto iris al la rezervataj lokoj. Ŝi paŝis rekta, iome rigida, penante impresi la rigardantojn per siaj eleganteco kaj alloga virina ĉarmo. Per unu mano ŝi levetis la robtrenajon, en la alia tenis etan mansaketon. Ŝi rigardis al la tablaro, tien-ien sendante salutojn aŭ kapkline reciprokante riverencojn. Kiam ili interiris la flanke starantajn tablojn, ĉe unu leviĝis juna paro. Ŝeliga vikle kaj gaje plenumis la devojn de mastro:

- Permesu, gesinjoroj, jen fraŭlino Elza Paŝ - li prezentis la junajn gefianĉojn - sinjoro Jacek Broda. Gesinjoroj Birecki!

Post la kutima ceremonio li klopodis rompi la komencan rigidecon kaj krei gajan etoson. Vere, post kelka tempo ekfluis ŝercoj, interparolo, rido - fadeno de vigla amuzo estis nodita.

Iumomente Ŝeliga leviĝis:

- Pardonu min, gesinjoroj. Por momento mi malaperos ĉar necesas trovi mian trezoron!

- Kie vi perdis ĝin? - ekridis Birecka.

- Post la danco ŝi ne venis.

Li sin direktis al la kontraŭa flanko de la salono, kie sidis lia edzino. Rimarkante lin de fore, ŝi leviĝis kaj ili ambaŭ revenis al la tablo. Dumvoje Ŝeliga interŝanĝis kelkajn vortojn kun kelnero.

Ĉe la tablo Ala Ŝeliga gaje bonvenigis gesinjorojn Birecki:

- Nu, fine! Ni jam pensis, ke ni devos amuziĝi sen vi!

- Ŝeligova jam videble estis impresita per la varma etoso de la amuzado. La virinoj, ne ĉesante gaji, fulmdaŭre pririgardis reciproke siajn robojn. En tiu momento al la tablo venis kelnero. Mezen li metis teleron plenan de garnitaj pantranĉaĵoj, poste pokaletojn, kiujn li plenigis per *Cherry Brandy*.

- Kion vi faras, sinjoro! - ekkrietis Birecka, simulante konvenan riproĉon. - Ni apenaŭ venis kaj vi jam volas nin akvumi!

- Nepre, nepre, sinjorino - Ŝeliga klopodis esti ĝentila -

sen akvo nenio floras. Mi volas, ke vi floru ĉi tiun nokton!
- li prenis glaseton kaj per signifa movo instigis ĉiujn fari samon.

Oni eltrinkis la unuan fojon.

La orkestro ekludis. Jacek leviĝis kaj invitis la fianĉinon al danco. Ankaŭ ambaŭ sinjoroj riverencis al siaj edzinoj. Sur la pargeto densiĝis. La paroj ŝovadis sin per ritmaj movoj ĉirkaŭen, de tempo al tempo kunpuŝiĝadis, pardonpetis ĝentile kaj cirkulis pluen. Tiam-iam iu ekridetis kaj per movo de la kapo riverencis al konato. La virinoj penis esti elegante molmovaj, tentaj, ne avaris alridetojn kaj kaŝe observis efikon de sia vesto.

La muzikistoj baldaŭ ĉesis. Eksonis aplaŭdoj, oni direktiĝis al la tabloj sed antaŭ ol la homoj sukcesis atingi siajn lokojn eksonis akra sono de trumpeto. Unu muzikisto alpaŝis la rondon de la podio kaj laŭtvoĉe anoncis:

- Nun la sinjorinoj invitas la sinjorojn al valso! Ni petas sinjoron balestron transpreni la gvidon!

- Nu, Ala - diris gaje Ŝeligova al sia kunulino - ni devas ekagi! Kion pri interŝanĝo de l'sinjoroj?

- Konsentite! - respondis Birecka kaj alparolis Ŝeligan - Sinjoro, nun en miajn manojn!

Gaje la kvaropo revenis sur la pargeton. La orkestro jam ludis. De la podio fluis basaj, molaj tonoj de "Songidealoj", per lantaj turniĝoj la paroj glitis ĉirkaŭen, sur la pargeto fariĝis multobla vortico. La malpli kutimiĝintaj al dancado eksentis etan kapturiniĝon.

- Rondon! - eksonis voĉo de l'balestro. La kirlaĵo ĥaos-iĝis, haltis kaj malrapide transformiĝadis je granda, ĉirkaŭ-pargeta rondo.

- Dekstren! - La rondo, ligita per manoj, popaŝe turnis sin dekstren konforme al la ritma melodio.

- Maldekstren! - Post momenta deformiĝo la rondo turniĝadis maldekstren.

- La sinjoroj invitas la sinjorinojn de dekstre!

Post momento sur la pargeto denove vorticis gedancantoj, nun ofte tute fremdaj al si. Kelkaj viroj tiamaniere sukcesis perdi proprajn edzinojn. La estro ne ripozis longe, post kelkaj turniĝoj li haltis kun sia kunulino kaj denove anoncis

laŭte:

- Paron post paro!

Iom post iom la paroj aliĝadis al la nun duobla rondo cirkulanta ĉirkaŭen. Kiam neniu plu dancis, la balestro decidis montri pli altan nivelon de sia kapablo. Li direktiĝis al la mezo de la podio kaj alvokis:

- Unu paro dekstren, unu maldekstren!

La paralelaĵo lante disbranĉiĝadis je du rondoj turniĝantaj al kontraŭaj direktoj. Kiam post kelkaj turniĝoj la du komencaj paroj denove renkontiĝis, li komandis:

- Kvarope antaŭen!

Baldaŭ la du rondoj komencis transformiĝi je vasta kvadrata vicaro, lante, ritme paŝetanta sur la pargeto.

- Unu kvaropo dekstren, unu maldekstren! Ĉiu kvaropo formas rondon!

Vicon post vico la antaŭaj kvaropoj ĉirkaŭfluadis la kvadratan aron kaj post ĝi ŝanĝiĝis je etaj, malrapide turniĝantaj rondetoj. Post kiam faris tion la lasta vico, la pargeto estis plena de malrapide ĉirkaŭenpaŝantaj rondetoj. Malaperiĝis ilin denova komando de l'balestro:

- La sinjoroj invitas la sinjorinojn. Ĉiuj valsas!

La amuzantaro denove ekvorticis amase. Ĉi tiun fojon la valsado daŭris iom pli longe, tiu-iu pli grasa ekanhelis. Dum pli intima alpremiĝo la nazon atingadis feblaodoro de l' ŝvito. Sed jen la voĉo de l'balestro denove diserigis la densaĵon:

- Turniĝi al si reciproke!

La du vicoj - vira kaj virina - faris duonturniĝon.

- Ĉiu sinjoro invitas sian sinjorinon al valsado! La tuta salonego dancas!

Baldaŭ la vicoj malaperis, ŝanĝiĝinte je densa vortikaro. Ĝi ne kirladis longe ĉar jen ankaŭ la orkestro perdis la konstantan ritmon, transiris al *coda** kaj baldaŭ per laŭtaj, fortaj agordoj finis la valson.

Sekvis pli longa paŭzo. La pargeto dezertiĝis, restis sur ĝi nur du viroj tenantaj sin je talio kaj ŝancele irantaj al la bufedo. Iliaj nigraj vestoj estis priŝutitaj per konfetoj kaj eroj de paperaj bendoj. En la salonego denove aperis kelneroj, tie-ie eksonis kanto, ne ĉiam pura, la tabloj zumis kvazau abelujoj.

Pasis kvaronhoro. Sur la podio la muzikistoj denove prenis la muzikilojn, kurtan tempon ili interkonsentadis, poste aliris la randon de l'podio. Momenton ili rigardis sin reciproke, kaj subite la salonegon plenigis tonoj akraj, altaj kaj rapidaj. Incita tvisto ekvĥipis la gedancintojn kaj denove pelis ilin sur la pargeton. Ĉe la tablo de Birecki aperis junaj viroj kaj petis la sinjorinojn al danco, foriris ankaŭ la junaj gefianĉoj. Birecki kaj Ŝeliga restis solaj.

Post kiam sur la pargeto fariĝis densaĵo, la muzikistoj komencis spektakli. Unu post la alia transprenadis la melodion kaj kontinuigis ĝin en diversaj variacioj, nur la tamburisto laboris senĉese, ritmigante siajn kolegojn kaj la tutan svarmantaron. La dancantoj pli kaj pli subiĝadis al la bola, vibriga ritmo de l'muziko, ĉesis interparoloj, kutimaj dum aliaj dancoj, daŭris nur senlaca kvaronturniĝado. La fleksitaj korpoj ŝoviĝadis rapide jen dekstren, jen maldekstren, jen ili leviĝis, jen proksimiĝis al la planko. La pli junaj kaj sveltaj sukcesadis sekvi la rapidajn ritmojn, por la pli grasaj tio estis laciĝaĵo. Tie-ie en la amaso pli larĝaj subdorsaĵoj peze, plumpmove penis postsekvi la viglan melodion. Videblis jam efiko de la amuzado, la freŝo de la virinaj vizaĝoj, atingita per penaj antaŭbalaj klopodoj, malaperis, sur la vizaĝoj de la viroj senĝene brilis ŝvito.

De ĉe la tablo Birecki kaj Ŝeliga observis la spektaklon. Iliaj rigardoj vagis de unu dancantino al alia, en la okuloj alternis ekbriloj jen de humuro, jen de ekscito. De tempo al tempo unu al la alia ĵetis diskrete pipran ŝercon koncernantan iun el la virinoj aŭ ties plej atrakcian korpoparton. La trafaj pritaksoj pruvis bonan konon de l'varo.

Post kelka tempo Birecki ekstaris:

- Pardonu, mi malaperos por sekundo - li diris al la amiko, komprenigante ke temas pri necesejo. Ŝeliga senresponde kapklinis kaj tuj revenis perrigarde al la dancantoj. Sed post kiam Birecki foriris, Ŝeliga ironie observis lin malaperantan en la pordo al kelĉambro, kie por la hodiaŭa nokto estis aranĝita infero.

La rabia kirlado finiĝis. Ŝeliga rimarkis, ke lia edzino aliris Birecka, pardonpetis la ŝin akompanantan viron, poste prenis ŝin je brako kaj forkondukis al sia danckunulo. Triope

ili foriris al la tablo, kie Ŝeligova amuziĝis jam antaŭe. Bi-recka estis prezentata, oni ekproponis al ŝi seĝon kaj tuj la amuzado ekfluis pluen. La gajega kompanio bruis, la virinoj disŝutis kaskadojn de rido responde al akraj ŝercoj de viroj. De tempo al tempo de sur la tablo suprenleviĝis manoj kun plenaj pokaletoj.

Ŝeliga de ĉe sia tablo observis la scenon trankvile, nur de tempo al tempo sur lia vizaĝo aperis rideto. Kiam lian tablaron estis preterirantaj liaj gekonatoj, li alridetis ilin kaj invitis alsidiĝi.

La tempo fluis, danco sekvis dancon, botelo botelon. Ŝeliga, jam ne tute sobra, iniciatis tostojn kaj koketis virinojn, eĉ ne atentante la ĉeestantajn virojn, kiuj penis esti gajaj, tamen de temp' al tempo ties aŭ alies vizaĝon trakuris grimaco de kolero.

Sub la tablo li alŝovis sian tibion al tibio de Elza kaj fro-tis ĝin incite. Ŝi deŝovis la sian, alpremĝis ĝin denove, denove forŝovis hezite, timetis ke la fianĉo ion rimarkos, tamen post momento denove alpremadis ĝin al tibio de Ŝeliga, ne tute malkontenta. Ankaŭ ŝin jam efikis la specifa etoso de l' balo.

Kiam la orkestro ekludis, Ŝeliga leviĝis kaj riverencis al ŝi.

- Vi certe permesos, sinjoro, ĉu? - li turnis sin konvene al Jacek, kiu klinis la kapon aprobe, kvankam videble sen plaĉo. Ankaŭ la ceteraj sinjoroj invitis siajn edzinojn, Jacek ĉe la tablo restis sola. Li ne forlasis la lokon sed kaŝe observis la gedancantojn.

Ŝeliga komence dancis konvene, tamen iom post iom li fariĝis delogema. Per la dekstra mano li vagis sur la dorso de Elza, alpremadis sin perbruste al ŝiaj mamoj kaj de tempo al tempo, dum dancado, premis sian gambon inter la ŝiajn. Samtempe li provis ravi ŝin per pasiaj rigardoj en ŝiajn okulojn. Elza komence dancis rigide, deŝovadis sin de li, sed poste pli kaj pli cedadis. La incita etoso de l'amuzo kaj ankaŭ la efiko de alkoholo iom forgesigis ŝin pri la fianĉo, febligis la naturan virinan rezistemon, malkaŝante la ĝene kaŝatan sensemon. Dum pli fortaj alpremiĝoj ŝi flustris riproĉe - Ho, sinjoro! - sed en ŝiaj okuloj mankis vera indigno.

Jacek observis ilin kaŝe, nerimarkate. Kelkfoje li volis leviĝi, alkuri la dancantan paron, deŝiri la virinon kaj vangofrapi la duonkalvan voluptulon, sed li sidis senmova, ne povante decidiĝi je tia konduto rilate homon konatan kaj opiniatan influa.

La dancanta paro rondumis lante laŭ sentimentalaj tonoj de la orkestro. Iumomente, kiam Ŝeliga - eble forgesinte ke ili estas proksime al propra tablo - enprofundiĝis rigarde en la okulojn de Elza kaj ŝi reciprokis la rigardon, Jacek subite, nerveze leviĝis, brue forŝovante la seĝon. Elza turnis la kapon al li kaj konsterniĝis. Jacek eliris el inter la tabloj, preteriris tuj ĉe la paro kaj rapide direktiĝis al la pordo. Ŝeliga ekkonsciis kio okazis. Li iomete konfuziĝis sed ne volis montri tion al Elza, do per ŝerco li penis bagateliĝi la eventon. Tamen vane. En la cerbo de la juna virino subite naskiĝis timo. Ŝia simpla menso elkalkulis ke ne valoras perdi, pro efemera amaĵo, la eblecon edziniĝi kaj akiri deziratan propran hejmon.

- Pardonu, sinjoro - ŝi liberiĝis el la brakoj de Ŝeliga - mi devas eliri.

- Jes, jes - li respondis ridete - nepras trankviligi la tempeston.

Kiam ŝi malaperis, li aliris la tablon, sidiĝis, plenigis pokaleton kaj eltrinkis senzorge.

Elza enrigardis la bufedĉambron sed tuj retroiĝis kaj rapide direktis sin al la vestejo. Ĉe la vesteja tablo Jacek estis surmetanta la mantelon. Elza aliris lin kaj diris nerveze, tremvoĉe:

- Jacek! Kion vi faras?

Li ne respondis, ne rigardis ŝin, nur silente butonumis la mantelon. Elza kaptis lin je la brako:

- Jacek! Ne faru skandalon! Kion ili pensos!

- Via afero! - li raspe liberigis la brakon el ŝia mano. Ŝi alpremiĝis al lia brusto:

- Jacek! Restu, ne foriru!

- Lasu min! - li ekpafis per sibla, frosta tono. Kaj tuj ironie rigardis ŝin. - Jen bona materialo je edzino! Ha, ha, bone ke vi malfermis al mi la okulojn!

Li krude forpuŝis ŝin kaj eliris eksteren. La okuloj de Elza

malsekiĝis. Ŝi forkuretis en la balĉambron, revenis, nerveze, rapide donis la markon al la vestejisto, kaptis la mantelon kaj elkuris el la hotelo.

Ŝeliga sidis trankvile, denove rigardante la tablon, kie sidas lia edzino kaj Birecka. Iumomente tiu lasta, kvazaŭ sugestita de li, turnis la kapon flanken kaj renkontis lian rigardon. Ŝeliga per diskreta kapklino kaj movo de fingro donis al ŝi signon, ke ili dancu kune. Ala ioman tempon ne respondis, sed poste lante, de neniŭ rimarkata, kapjesis. Ŝeliga atentis neniun, sidis solece kaj fumis. Gvate li rimarkis, ke Birecka leviĝis kaj forlasis la salonon. Li atendis momenton kaj poste ankaŭ promene direktiĝis en la bufedejon. Ili renkontiĝis, kvazaŭ hazarde, ĉe la perdo.

Kelkan tempon ili dancis silente, iom rigide, poste iliaj rigardoj pli kaj pli ofte renkontiĝadis kaj la febla intertuŝo de la korpoj ŝanĝiĝis je forta alpremiĝo.

- La danco kun vi estas poemo! - diris Ŝeliga spektante en ŝiajn okulojn. Birecka ekridetis:

- Kioma virino mi estas, laŭvice, al kiu vi diras tion?

- La unua, al kiu mi diras tion sincere.

- Sed la kaŝata intenco estas la sama.

Ŝeliga post momento respondis per demando:

- Se estus tiel, ĉu vi estus malkontenta?

Ŝi ne respondis.

- Nu? - Ŝeliga insistis, ne volante perdi okazon por eknodi fadenon pri kiu li jam de kelka tempo pensadis kaj kiun li komencis konkrete ŝpini dum la hodiaŭa balo.

- Ĉu vi volas devigi min je konfeso?

- Ne nepre, mi volas nur esplori, ĉu miaj sentoj renkontos almenaŭ ioman reciprokon.

- Tion vi devas senti mem. La virinoj ne tre rapide deklaras siajn emojn, prefere la viroj mem divenu ilin.

- Nu, kaj vi estas precipe sekreta, mi vidas.

Birecka ekridetis:

- Des pli forte vi devas esplori min!

- Tion mi certe faros sed mi petas pri indulgo. Mia fideleco al vi ja meritas apartan traktadon! - li rigarde profund- iĝis en ŝiajn okulojn. Ŝi reciprokis, longan tempon ili dancis

silente, nur la intertuŝo de la korpoj intensiĝis. Iumomente Ŝeliga diris:

- Bedaŭrinde, jam nelonge daŭros nia feliĉo.
 - Bedaŭrinde.
 - Sed ni povas retrovi nin.
 - Kiel?
 - Ja eblas forveturi ien por dancado.
- Birecka kelkan tempon ne respondis.
- Nu? - li insistis.
 - Iu povas nin vidi...
 - Estas lokoj, kiujn preskaŭ neniu konas.
 - Vi estas sperta fakulo, mi vidas.
 - Kaj vi evitas la respondon!
 - Ĉar mi ne volas esti laŭvica, ne sciante kioma, via kapt-aĵo.
 - Plaĉas al vi turmenti min! - Ŝeliga iomete malsereniĝis.
- Sur la vizaĝo de Birecka vagis febla, spita rideto.
- Kiam forsonis la muziko, Ŝeliga ekdisponigis al ŝi sian brakon kaj ili lante paŝis al la lokoj. Ĉe la tablo, antaŭ ol sidiĝi, li per febla moveto haltigis ŝin kaj ekflustris:
- Nu, ĉu iam moliĝos via koreto?
 - Eble, eble... - ŝi kaŝe premetis lian polmon, poste rapide lasis ĝin kaj sidiĝis. Ankaŭ Ŝeliga eksidis, prenis botelon, verŝis en du pokaletojn kaj diris:
 - Nu, je nia feliĉa estonto!
- Ili eltrinkis ĝisfunde.

Pasis kelkaj dancoj. Kiam la orkestro komencis laŭvican ludon, Birecka restis sola. Tiam ŝi rememoris pri sia edzo. Ŝi ĉirkaŭrigardis en la salono, momenton sidis silente, ion meditis, poste subite levigis kaj direktiĝis al la bufedejo. De la pordo ŝi direktis la rigardon enen, retroiĝis, momenton hezitis kaj tuj rapide aliris la proksiman ŝtuparon kaj ekdescendis.

La ne tro vasta kelsalono, por la nuna balo aranĝita kiel "infero", estis - malgraŭ tarda horo - plenplena. En la densa, peza aero ŝvebis specifa odormiksaĵo de fumo, alkoholaĵoj, polvo, diversaj parfumoj kaj homa spirado. La feblaj, sur-

mure fiksitaj ebenaj lampoj kovritaj per ruĝa krepo kolorigis la tutan ejon strange ruĝkoloro. Ŝajnis, ke plenigas ĝin nebulo saturita per sango.

En tiu duonlumo svarmis homoj. La ŝvitintaj vizaĝoj, nun pale ruĝaj de la lumo, konformis al la medio. En angulo malgrandan bufedon dense ĉirkaŭstaris viroj, jam videble nesobraj. Ĉirkaŭ kelkaj tabloj la amuziĝantoj, ligiĝinte per interplektitaj manoj, balancetis jen dekstren, jen maldekstren - laŭ sia ebrieta kantado. Videble lacaj estis la muzikistoj. Vestitaj per helaj pantalonoj kaj terakotkoloraj jakoj, ili sidis velkinte, ne emaj al plua muzikado kaj daŭrigantaj la ludon nur pro devo.

Tian medion eniris Birecka. Paŝante malrapide, ŝi penetris la ejon, direktis la rigardon al la bufedo, denove al la tabloj. Duonatente ŝi respondis riverencojn de kelkaj viroj, haltis, kaj post momenta pripenso direktis sin al du viroj fumantaj apud la pordo. Unu el ili verŝajne estis ŝia konato, ĉar li riverencis ĝentile. Birecka aliris tute proksime kaj demandis:

- Ĉu vi vidis mian edzon?
- Jes, li estis ĉi tie antaŭ nelonge.
- Ĉu li estis ebria?

La du viroj ekhezitis embarasite. - Nu, li iomete trinkis.

- Sinjoro Andreo - Birecka rigardis lian vizaĝon - kio denove okazis?

- Verdire, li iom multe trinkis.

- Ĉu io okazis?

- Estis ioma kverelo, kiel kutime.

- Vi ne volas diri al mi la veron, sinjoro, sed mi sentas ke denove okazis ia skandalo.

- He, skandalo, ne troigu. Oni ekdisputis pri io, via edzo frakasis glason kaj vitran tablosurfacon.

- Dio mia! Jam denove! Sed kie li estas? Ĉu oni elĵetis lin?

- Elĵetis? Ja baldaŭ ĉio kvietiĝis kaj li sidis ĉe la verŝ-tablo. Antaŭ nelonge mi ankoraŭ vidis lin ĉi tie.

- Dankon, mi provos serĉi lin. Ĉu iu vidis tion?

- Nu, estas homoj ĉi tie.

- Jes... Nu, dankon! - Birecka foriris.

Sur la ŝtuparo ŝi denove ekhezitis, poste rapide ekiris al

la bufedĉambro. Tamen jam ĉe la pordo ŝi rimarkis, ke la edzo ne estas tie. Ŝi retroiĝis kaj rapide iris al la vestejo.

Multaj homoj estis jam forlasantaj la balon, la vestejisto vigle laboris.

- Ĉu estis ĉi tie mia edzo?

- Jes, sinjorino, li jam foriris.

- Foriris? Kien?

- Nu, verŝajne hejmen.

Birecka ekmiregis.

- Hejmen? Ĉu li prenis la mantelon?

- Jes.

- Kaj li iris eksteren? Kiam?

- Ŝajnas, ke antaŭ kelkaj minutoj.

Birecka staris mirigita. Poste ŝi ĵetis rapide:

- Bonvolu doni mian pelton.

Ŝi ĵetis la markon sur la tablon, kaptis la mantelon, dum-paŝe surmetis ĝin, butonumis nervoze kaj, levante la kolumon, eliris sur la straton.

Ekstere frostis, unuopaj neĝeroj faladis lante teren. Birecka ĉirkaŭrigardis kaj ekiris rapide laŭ la strato direkte al la hejmo. De tempo al tempo etaj homgrupoj aŭ unuopuloj paŝis tra la stratoj, ili verŝajne revenis de diversaj amuzadoj. Birecka iris rapide, penetrante per la rigardo dekstren kaj maldekstren, de tempo al tempo ŝi haltis, spektis atente iun pasanton, poste denove plirapidis. Ŝi kelkfoje returnis la kapon, supozante, ke eble la edzo restis ie en la hotelo, sed vane. Post kelkminuta irado ŝi atingis la urboplacon kaj, ĝin trapaŝinte, ŝi ektroviĝis sub la longa arkadaro. Kaj ĝuste tiam ŝi rimarkis viron starantan apud dika murkolono. Rigardinte lin pli atente, ŝi eksentis varmon en la vizaĝo kaj proksimiĝis kun nervoza streĉo.

Apud la kolono staris Birecki. Per unu brako li apogis sin je la muro, la duan li premis alventren. Lia ĉapelo deŝovis sin malantaŭen, montrante la ŝvitintan frunton kaj la taŭzitaajn harojn. De tempo al tempo li estis skuata de konvulsioj pligrandigantaj la vomitaĵon ĉe la muro.

- Luĉjo, je dio! Kion vi faras? - Birecka pro nervozeco eĉ ne povis koleri. Birecki malrapide turnis la kapon:

- Lasu min - li balbutis neklare.
- Venu hejmen!
- Lasu min. Iru, mi venos pli poste.
- Tuj venu hejmen. Vi ne povas ĉi tie stari.
- Mi venos. Iru.

Birecka ne plu parolis sed prenis la edzon je la brako kaj forte tiris lin de la muro. Jam kvietiĝadis en ŝi la nervozeco kaj timo, pli kaj pli anstataŭataj de kolero. Ŝi nun pensis, en kia stato la edzo forlasis la balon kaj kiu vidis lin tia. Troigitaj supozoj amarigis ŝian humoron kaj faris ŝin eksplodema.

Ili iris sub la vasta arkadaro silente - ŝi kolere, per energiaj paŝetoj, li ŝancele, duonkonscie, tirata de ŝi. Nemultaj preterpaŝantoj observis ilin, ridetante ironie. Birecka rigardis ilin kaŝe, honteme turnante la vizaĝon al alia flanko. Birecki tute malatentis, ne perceptante la mondon.

Post kelkaj minutoj ili proksimiĝis al la "Centra Restoracio". Tra grandaj fenestroj la lumo heligis la tutan trotuaron, el trans la vitroj alvenadis obtuzaj sonoj de orkestro. Birecka, forgesinte por momento pri sia situacio, haltis, kaj tra fendoj inter la fenestrokurtenoj gvatis enen. Ŝi probable estus spektanta pli longe, sed jen malfermiĝis la pordo kaj aperis homoj. Ŝi rapide retroiĝis, ektiris la edzon kaj emis iri pluen, tamen subite haltis je sendube al ili direktita:

- Saluton, gesinjoroj!

Ŝi ekrigardis pli atente la gajan paron kaj konfuziĝis. Estis la partia sekretario kaj la edzino. Ili ambaŭ gajis ankoraŭ pro la ĵusa amuzo.

- Ankaŭ vi hejmen, ĉu?

- Nu, estas tempo... - Birecka respondis perplekse, volante kiel eble plej rapide preteriri, sed jen la sekretario rimarkis la staton de sia sampartiano kaj ekŝercis:

- Nu, nu, kamarado Birecki, mi vidas, ke vi forte apogis nian alkoholkomercon?

Birecki ekrigardis lin pli atente per siaj nebulaj okuloj kaj subite rektiĝis. Li ridetigis flate sian vizaĝon kaj ekvokis:

- Saluuuton, kamarado sekretario! Nu, kia renkontiĝo! - je tiuj vortoj li interrompis, ekŝanceliĝis kaj subite per rapidaj paŝoj ekrapidis antaŭen: lia edzino, kolerega, forte ektaŭzis lin kaj de antaŭ la luma pordo fortiris en mallumon. ■

FORNOJ

Lastatempe ni vizitis etnografian, montaranan muzeon. Specifaj mebloj, tinoj por lakto kaj akvo, laboriloj, teleroj kaj kuleroj, lantondiloj, gemontaranaj vestoj k.s., dislokitaj en montaraneske aranĝita ĉambro, atestis pri la pasea vivmaniero. Sed la atenton de mia kvinjara filo altiris nur la forno. Granda, masiva fornego, okupanta preskaŭ kvaronon de la tuta ejo, enhavanta ne nur fajrujon sed ankaŭ bakujon. Sur la forno povis kuŝi kelkaj homoj kaj malantaŭ ĝi estis loko por ligno.

- Paĉjo - plendis la knabeto - kial ni ne havas tian fornون? Mi povus grimpi sur ĝin, aŭ kaŝi min post ĝi kiam ni ludas "sinkaŝadon". Aĉetu tian fornون!

- Jes, jes, mi aĉetos. Se mi nur trovos tian en vendejo...

Nu, vidu kian interesiĝon povas veki forno! Cetere, mi rigardis ĝin same scivoleme, kiel la knabo, nur la kaŭzoj estis aliaj. En mi ĝi vekis rememorojn. Tian fornون mi jam foje vidis kaj la tento rakonti tion venkas min.

Antaŭ dudek jaroj, estante juna studento, mi dum kelkaj liberaj semajnoj anstataŭis mankantan instruiston en apudmontara vilaĝo. En la vilaĝoj la ĉefaj personoj oni opinias la pastron kaj la instruiston, kaj estas kutimo inviti ilin, sendepende ĉu oni konas ilin aŭ ne, por ĉiu grava festo, precipe por nuptoj. Kaj tiel ankaŭ mi, cetere homo ne konata sed "sinjoro instruisto", foje fariĝis nuptofesta gasto.

Ligna montarana kabano plena de homoj, homoj en la vestiblo kaj grupete ĉirkaŭ la kabano, tonoj de montarana kapele, ŝercoj kaj ridoj, kantado de gastoj sobraj, sobretaj kaj aliaj, aromoj de diversaj manĝaĵoj, biero, brando, tabaka fumo - jen kelkaj ingrediencoj de tiuj medio kaj etoso en kiuj ek troviĝis mi, junulo etstatura, ne tro kuraĝa, pli librulo solecema ol babilema societemulo. Devigite akcepti la inviton, mi esperis "enŝteliĝi" inter la gestojn nerimarkite, sidiĝi ie en angulo kaj plej baldaŭ forkuri el tiu, al mi fremda, socio de ferstomakuloj.

Sed vane! Jam antaŭ la domo oni min rimarkis, salutis brue kaj are kondukis en la ĉefan ĉambron kie jam estis sidantaj la plej honorindaj gastoj. Sed tio ne signifis ke mi jam povis sidi en trankvilo. Tuj aperis antaŭ mi la patro de la novgeedzoj kaj plenigis mian pokalet(eg)on per *vajonka*. Sed antaŭ ol mi sukcesis surtabligi firme la glaseton, ĝi malgraŭ mia protesto denove estis plena.

La du pokaletoj da *vajonka*, estantaj por la ceteraj gastoj nur guto en maro, min vigligis kiel spronoj ĉevalon - venis kuraĝo, eĉ babilemo. Sed - stultulo! - mi subtaksis la danĝeron de la popolaj kutimoj. Laŭ ili la gastoj (la viroj) proksime parencaj al la novgeedzoj, ekz. iliaj patroj, onkloj, la nupto-atestantoj k.s., alportas alkoholon kaj poste ofertas ĝin al la gastoj. Kaj rifuzi ne licas!

Vi, kiuj ne drinkas, imagu kio okazus, se tia vico de "enverŝantoj" estus defilinta antaŭ via glaseto! Jam post kelkaj "ofertaĵoj" mi sentis min kvazaŭ post rapida veturo per karuselo. Eskapi! - vibris en la cerbo, kaj per necertaj paŝoj mi direktis min al la pordo. Tamen la alkoholo jam estis efikanta - mi elektis malĝustan pardonon. Anstataŭ eksteren, mi eniris la ĉambron por dancado. Tonoj de muziko, amaso da homoj vorticantaj en la plenplena ejo - jen kion ekvidis miaj nebulecaj okuloj. Sed ili rimarkis ankoraŭ ion alian: fornon! Grandegan, masivan fornogon okupantan kvaronon de la tuta ejo. Ĉe ĝi sidis kaj ludis la kapelo.

- Ĝi estas savo, ĝi kaŝos min! Post ĝi troveblas soleco kaj trankvilo! Post ĝin, post ĝin! - mi pensis streĉe. Nerimarkate de la brue vorticantaj gastoj, mi preter la vandoj paŝetis al la sopirata loko. Sukcese. Antaŭ ol finiĝis la danco, mi estis atinginta la angulon post la forno kaj sidiĝinta sur benketo staranta ĉe ĝi. Venis trankvilo kaj la pensoj ree koncentriĝis ĉirkaŭ mia stato. Ĉi tie mi evitos la atenton kaj post kiam iome forpasos la vertiĝo, mi eskapos. Dum la dancado!

- Kreteno! - mi poste riproĉis min mem. Tiel stultan penson povis naski nur via ebria kapaĉo!

vajonka - popola likvoro produktata el mielo, alkoholo kaj spicaĵoj, trinkata varma.

Ankoraŭ ne komenciĝis la sekva danco, kaj jam oni min rimarkis. Precipe la virinoj ne kapablis toleri, ke viro restas pasive.

- Kion? Nia sinjoro instruisto ne dancas? Nee... tion ni ne permesos! Dum nuptofesto ne danci? Kiu vidis?

Ili kaptis min subbrake de ambaŭ flankoj kaj, tute ne atentante ĉu mi volas tion aŭ ne, ĝentile sed senceremonie eltiris el mia kaŝejo. Rimarkinte nun pli bone mian necertan teniĝon, ili kunpremendis ridete la lipojn kaj palpebrumadis unuj al aliaj.

- Orkestro, ludi, ludi! - vokis kelkaj, tiel pelante la muzikistojn al la instrumentoj. Kaj la unuaj tonoj de la muziko definitive faligis sur min la kaptilan reton.

- Nu, sinjoro instruisto - vokis la virinoj - al dancado! Tuj kaptis min la plej proksima kaj mi devis danci laŭvice kun ĉiu almenaŭ dum kelkaj momentoj.

Sed la aventuro trovis sian kulminon post kiam kaptis min la lasta. Malgraŭ la vertiĝo kaj duba sobreco mi rimarkis, ke estas virino fortika, ĉirkaŭ tridekjara, dika sed belstatura, kun ruĝetaj vangoj kaj nigra hararo - montarana belulino. Jam plenigis ŝin la nuptofesta gajo, ankaŭ iome la alkoholo, ŝi amuziĝis sincere, tutkore kaj tutkorpe. Per fortaj brakoj de vivoplena montaranino ŝi, dancante persiste, tenis min, premis sin al mi kaj min al si tiel ke dum pli vigla movo mi aspektis iome kiel pupo ĉifona, kiun infano premas al la brusto kaj skuas dekstren-maldekstren.

Ŝia korpo bolis, radiis varmon plenigantan min pli kaj pli, la abundaj mamoj incite premis min, vekante atributojn de mia vireco sed ankaŭ pligrandigante la konfuzon, ja mi timis kio okazos post la finiĝo de la danco. Kiel prezenti min en tia ebrieta-incitita-ĉifonita stato al la gastoj? Do mi dancis persiste, streĉante fortojn, por ne fariĝi viktimo de l'virino. Kaj la proverba "gramo de fortuna" helpis min. Kiam la orkestro ĉesis ludi, ni troviĝis tuj ĉe la malfermita pordo. Simulante gajon, mi ĝentile direktis nin tien, sed eĉ sen tio ni estis devantaj rapide eliri, ĉar la anhelanta gedancintaro puŝis nin antaŭ si. Mi kondukis mian kunulinon en la mangŝambron, riverencis ĝentile kaj rapidis ekstren, ja estis plej urĝa tempo. Nur ekstere, en la freŝa aero, forpaŝinte iom de

la domo, mi estis malrapide revenanta al la vivo.

Ĉu en la kabano oni priridis min, kiel obstine ŝajnis al mi, mi ne scias. Sed malgraŭ ke post tiu evento pasis jam dudek jaroj, mi ĝis nun memoras tiun unikan kapturmon kaj ĝis nun mi sentas sur mia brusto tiujn molaĵon kaj incitan varmon. Kaj rememorante, mi ĉiam ripetas: jes, jes, iame estis fornoj! ■

RIKOLTO

Unu el la devoj de l'homo estas semi bonon. Se li tion faras, li rajtas trovadis bonon, sed se li semas malbonon aŭ ĝin apogas, li ne miru kiam li trovos sin devanta rikolti sekv-ojn de siaj agoj.

Al ĉi tia konkludo gvidas okazintaĵo rakontita de maljuna kamparano, mastro de eta apudarbara bieneto. El lia rakontado, konfuza, influata per kortuŝo, formiĝis la sekvanta historio, tro valora, por fariĝi viktimo de la forgeso.

En provinca, nordĉeĥoslovakia urbeto loĝis - kun siaj patrino, edzino kaj filineto - frizisto. Vrabec - tia proksimume estis lia nomo. Inter la lokaj civitanoj li havis opinion de dando kaj fifierulo. Al la familianoj li rilatis ne malbone sed ankaŭ ne tre zorgeme, asertante ilin etpensaj provinculinoj, kaj sin mem - gravulo destinita por pli altaj celoj kaj ĵetita en provinčan barbirejon nur pro kaprico de l'sorto. Li vestadis sin laŭ provinca eleganteco, tre zorgis pri siaj polmoj kaj hararo, ĉiam klopodante simili al aktoroj el la avide legataj filmrevuoj.

Proksimajn amikojn li ne havis, tiujn timigis kaj forpuŝadis lia karaktero, precipe la malestima sinteno al aliaj homoj, al iliaj interesiĝoj, atingoj kaj admirataĵoj. Eble liaj altaj aspiroj kaj konvinko pri propra grandeco estis dolore incitataj de la konscio pri malgraveco de la frizista profesio. Li konstante atendadis nekларan "ion", kio ŝanĝos la ĝisnunan vivon kaj faros lin, kio li meritas esti.

Bedaŭrinde, venis okazo por tio. La Germanoj invadis Ĉeĥoslovakion, kaj iun tagon ili aperis ankaŭ en la urbeto.

La unuaj tagoj pasis trankvile, la loĝantaro malkviete silentis, jubilis nur nemultaj germanaj familioj, orgojle parolante germane kaj ostentacie* manifestante sian apartenon al la okupaciantoj. Aperis armeanoj ankaŭ en la frizejo, kunportante la hitlerisman etoson de orgojlo, rasisma mal-estimo al ĉio negermana, kaj konvinko pri sia supereco rilate la indiĝenaron, destinitan por servuto. Ne batalinte, ili estis

zorgeme vestitaj, puraj, kondukis sinjorece, do povis impresi homojn, kiujn la sorto dotis je inteligenteco modesta kaj aspiroj troe grandaj.

Vrabec, konante la germanan lingvon, kio pro historiaj kaŭzoj ne estas raraĵo en Ĉeĥoslovakio, interparolis kun siaj novaj gastoj kaj baldaŭ komencis sorbi iliajn ideojn. Vesperojn mi pasigis pli kaj pli ofte en lokaj kafejoj, el kiuj preskaŭ malaperis la ĉeĥa lingvo, nun parolata timeme nur en solecaj anguloj.

En kafejoj sonis novaj kanzonoj, en kiuj la eterna temo, la amo, forlasinte vinon, florojn kaj printempon, ĝemeliĝis kun soldato, kazerno, disiĝo kaj venko. Okazis amasaj manifestacioj, kiujn krom Germanoj partoprenis ankaŭ unuaj lokaj hitleranoj.

Tiel laŭ fluado de l'tempo estis ŝanĝiĝanta la ĝenerala etoso en la urbeto, cetere same kiel en la tuta lando. Granda plimulto de la loĝantaro rezignis pri kutimaj societaj interrilatoj, fokusigis sian vivadon en la hejmoj, avide ĉasadis militnovaĵojn kaj atendis liberigon; alia, eta parto, deklarinta germaniĝon, servis al la nova patrujo kaj ties granda "estro". Al tiu lasta apartenis Vrabec.

Komence li plu praktikis sian profesion. Preskaŭ unu jaron li ankoraŭ laboris en la frizejo evitata nun de Ĉeĥoj, sed li tute apartiĝis disde siaj iamaj gekonatoj kaj de ĉeĥaj loĝantoj, ne kaŝis sian aliĝon al la hitlerismo, paradante dum naciaj festoj en hitlerana uniformo. Homoj persiste flustris pri lia kunlaboro kun la loka *Gestapo*, kio post kelka tempo fariĝis certa kaj vaste konata.

En plej prema situacio ektroviĝis lia familio. Por la infano la nocioj politiko, patriotismo, moralo k.t.p. ankoraŭ ne estis klaraj, sed la du kompatindaj virinoj eniris vivon senigitan je ĝojo kaj trankvilo. Ili ne konis la germanan lingvon, suferis pro malfeliĉo de sia lando, kaj jen la sorto devigis ilin aŝkultadi insultojn pri la propra nacio, pri ties malsupereco, malvaloreco kaj destino servi al la nacio de sinjoroj kaj al ties "granda" 'estro.

Sed ankoraŭ pli abomena kaj turmenta estis, ke en la urbeto la nomo de la frizisto pli kaj pli fariĝis timigaĵo. La maloftuloj, sukcesintaj vive reveni el la gestapaj keloj, flustris

timege pri lia terura kruelemo.

La ĉefa scenejo, sur kiu li aktivis, estis malnova juda tombejo. La grandetan areon, kun multaj arboj kaj arbustoj, ĉirkaŭitan per alta ŝtonbarilo, ne plu uzatan por entombigoj, ĉar tiucele servis jam nova tombejo aliloke, elektis la urba Gestapo por ekzekutado. De tempo al tempo dum frua mateno, apenaŭ duonhela, la nemultaj loĝantoj de kelkaj domoj ĉirkaŭe estis vekitaj per pafoj. Time kaj triste ili ekkonsciis pri nova murdado. Kelkaj personoj, cele maldormante matene, atendis ĉe fenestroj kaj kelkiam el post la iomete, ekstreme singarde forŝovitaj kurtenoj sukcesis rimarki grupeton da homoj enirantan, tra fendo en la muro, la tombejon. Estis gestapanoj kun siaj viktimoj. La murdotoj, kun la manoj katenitaj surdorse, iris silente, obee, neniam okazis ke iu provis kontraŭstari. Kiam la tuta grupo venis al fiksita loko, ĉiu ekzekutoto devis fosi sian tombon kaj poste genuiĝi sur ties rando. Nun sekvis la murdo. La gestapano de malantaŭe proksimigis revolveron al la kapo de la viktimo, pafis, kaj la korpo falis en la kavon.

Iutage Vrabec revenis hejmen pli frue ol kutime. La edzino rigardis lin mire, maltrankvile, kaj fine demandis:

- Ĉu io okazis?
- Mi translokiĝas.
- Translokiĝas? Kion ĝi signifas? Kial...
- Nu, oni translokas min, ĉu vi komprenas? Ĉu mi klarigu, kiel al infano?

La edzino eksilentis, diveninte la ĝustan signifon de la vortoj. Post momento ŝi demandis:

- Kaj la frizejo?
- Vi estros ĝin.
- Mi? Mi ja ne estas frizistino!
- Ne gravas. La monon vi kapablas akceptadi. Cetere, mi revenos post eble kelkaj monatoj.

Sed li ne revenis. Post duonjara estado en ĉelima, kelkdek kilometrojn fora urbo, oni translokis lin aliloken, poste venis novaj ordonoj kaj novaj lokoj por "aktivado". Leteroj al la

familio, jam dekomence maloftaj, fine ĉesis alvenadi, la tri virinoj perdis - filon, edzon, patron.

La mastrumadon en la hejmo transprenis la maljuna patrino de Vrabc, la edzino ne plu povis restadi hejme ĉar la zorgado pri la frizejo postulis multajn klopodojn. Ŝi laboris diligente, sed post kelka tempo evidentiĝis, ke malgraŭ zorgado la frizejo ne donas tioman gajnon kioman antaŭe. Viroj evitadis ĝin, la dungitaj frizistoj ne plu laboris tiel, kiel antaŭe, kaj ili vereble dum ŝia foresto alproprigadis al si la pagatan monon, kion neniu kuraĝus fari, kiam la frizejon estris Vrabc. Nun la gajnata mono apenaŭ sufiĉis por vivteni sin de monato al monato, kaj laŭ fluo de l'tempo fariĝis pli kaj pli malbone. Hejme oni jam diskutis pri fermo de la frizejo kaj akcepto de salajrata laboro, kio ne estis malfacila, ĉar ĝenerale mankis gelaboristoj, sed jen neatenditaj eventoj mem ŝanĝis la situacion.

La patrino de Vrabc havis fraton. Li loĝis en montara urbeto apud la pola-ĉeĥoslovakia limo, mastrumante kun siaj edzino kaj fraŭla filo en negranda bieneto situanta iom ekster la urbeto, tuj ĉe rando de vasta montdekliva arbaro. La urbeto loĝantaro estis ĉeĥa, sed sub premo de la nova vokto - Germano - kaj de senĉesa minaco je perforta translokado, multaj familioj, unu post la alia, akceptis la germanan naciecon, fariĝante tiel "popoldevenaj Germanoj". Akceptis ĝin ankaŭ la frato de la maljuna Vrabcova. Li gajnis sekurecon por siaj familianoj kaj posedaĵo, sed samtempe ekminacis lin nova danĝero: soldatigo de la filo. Ĝi pendis kvazaŭ peza, fulmema nuboj super la kapoj de la tri homoj. Suferis precipe la patrino, obeema, silenta virineto, laboranta ekde frua mateno ĝis tarda vespero kaj, antaŭ ol ekdormi, pie preĝanta je savo de sia filo el la milita infero. Sed la preĝoj vanis.

Dufoje oni sukcesis reklamaci la filon, triafoje la decido estis negativa: la armeo bezonas soldatojn kaj en tiel danĝera milita situacio devas sufiĉi du homoj por la bieneto. Cetere, eblas klopodi pri devigaj laboristoj, ekzemple Poloj, Rusoj, Ĉeĥoj aŭ aliaj.

Por la patrino la soldatigo de la filo estis terura bato. En la tago mem, kiam li foriris, ŝi tute ne laboris, la bovinojn eĉ devis melki la edzo; ŝi sidis kun ruĝaj, ŝvelintaj okuloj en la ĉambro, senmova, la tutan nokton ŝi traploris en la lito.

La suno malaperis el ŝia vivo. Dum postaj tagoj ŝi vagadis en la bieneto kvazaŭ fantomo, plenumante siajn ĉiutagajn devojn aŭtomate, duonkonscie, ekstreme senĝoje. Kaj el tia stato ŝi ne plu eliĝis. Post kelkaj semajnoj, unu fruan matenon la edzo, vekiginte kaj rimarkinte ŝin ankoraŭ dormanta, kio neniam okazis se ŝi estis sana, alparolis ŝin sed ne ricevis respondon. Li ektaŭzis ŝin, kaj ekstremis. Ŝi kuŝis rigida, malvarma, trovinte morton same trankvilan kiel ŝi mem estis.

Kiam por la entombigo venis, interalie, Vrabcova kun la bopatrino kaj filineto, kaj restis ĝis la venonta tago, aperis okazo por interrakonti pri siaj zorgoj kaj ĉagrenoj. Tiam ankaŭ naskiĝis penso, ke ŝi fermu la frizejon kaj ili ĉiuj tri translokiĝu en la bieneton. Kaj, efektive, tiel okazis.

Dum frua printempo, kiam komenciĝas la sennombraj kamparaj laboroj, la du virinoj kaj la infano ektroviĝis en la bieneto, kies plej malofta gasto estis nun la ĝojo. Baldaŭ la vivo ekfluis plu, la urĝaj mastrumaj bezonoj ne permesis inertadi. Eĉ la infano devis plenumadi diversajn devojn antaŭe ne konatajn. La kampula vivo postulas multege da laboro, kiun neniu rajtas eviti. Oni jam eĉ malgrandajn infanojn ŝarĝas same kiel plenkreskulojn.

La bopatrino ne plendis, sed la edzino de Vrabc, senĉese okupata kaj vespere jam lacega, multfoje bedaŭris, ke ŝi konsentis translokiĝi. La vivo en la urbo tamen estis pli facila. Sed ne plu ekzistis ebleco de reveno, ĉiu devis porti la ŝarĝon de sia vivo.

Kaj je tia laborplena kaj laciga vivado pasis kelkaj monatoj. Iom post iom malakriĝis la dolorigaj rememoroj, nebuliĝis la bildoj de la ĵusa paseo, aperis novaj temoj, novaj aferoj kaj problemoj. Plena aŭtuno postulis zorgi pri la rikolto. Kaj ĝuste tiam, dum ŝajnis ke la monotonan ĉiutagecon de la trankviliĝanta bieneto nenio povas kirli, atingis ĝin nova, jen la lasta sed plej terura bato. La scenejo, sur kiu plenumiĝis tiu lasta akto de la dramo, troviĝis tamen ne loke sed en la apuda urbeto.

La domoj de la urbeto ariĝis dense, ronde, tiel ke ekster la densa aro staris tie-ie nur kelkaj, plejparte novaj vilaoj.

Unu el ili, belan, duetaĝan, konstruigis antaŭ la milito riĉa komercisto. Ĉar juddevena, li en la jaro 1938 forveturis kun la tuta familio eksterlanden. La domon ĉirkaŭis vasta ĝardeno de tri flankoj barita per drata reto, la kvara, malantaŭa ĝardenflanko limis kun rivereto preskaŭ nevidebla sub surbordaj arbustoj. Transe estis maldensa arbaro.

Tiun vilaon ekokupis Gestapo. Baldaŭ aperis ponteto ligna super tiu rivereto, kaj la arbaro fariĝis tombejo por la viktimoj de la murdistoj el la vilao. La keloj estis rekonstruitaj kaj adaptitaj je karceroj.

La pensoj pri tiuj keloj, kaj entute pri la vilao, al la urbaj loĝantoj kaŭzadis timan frostotremon. Ekde kiam Gestapo lokiĝis tie, dum la tuta milito neniu kuraĝis halti en proksimo, eĉ de malproksime oni ne kuraĝis observi la domon. Preterpasantoj plirapidigis la paŝojn, patrinoj avertis la infanojn ne aliri la barilon. La transĝardena arbaro, iam ofte vizitata kaj plena de gajo, nun restadis soleca kaj senviva. Pasadis monatoj sen ke oni vidis en ĝi civilan homon.

Fojan aŭtunan tagon, antaŭvespere, en la ĉefa ĉambro de la vilao sidis tri gestapanoj. Sen zonoj, oportune lokiĝintaj en apogseĝoj, ili interparolis, de tempo al tempo ridante pro spica ŝercaĵo. Post kelka tempo la pordo malfermiĝis kaj venis plia gestapano, venanta verŝajne el ekstere, ĉar li estis en plena uniformo. Kun laŭta "heil Hitler" li levis la manon, poste demetis ĉapon, pendigis ĝin sur hoko, tuj la samon faris kun la zono. Ĝuste dum li estis korektanta sian uniformon, ie elnajbare venis obtuzaj bruetoj kaj malespera krio.

Vrabec, ja la alveninto estis li, ekrigardis scivole la tri ceterajn virojn kiuj - kvazaŭ ili nenion aŭdis - sidis tute indiferentaj. Je lia rigardo, sen iu ajn demando, unu el la viroj diris neglekte, senemocie:

- Spach parolas kun du novaj gastoj.
- Nu?
- Du Ĉeĥinoj. Ili helpis partizanon.
- Ĉu li estas kaptita?
- Ne.

En la okuloj de Vrabec ekbrilis kolero. Li sidiĝis sur seĝo

kaj ĵetis grumble:

- Lastatempe ni kadukiĝas. Kial oni ne pafis?
- Sencele. Li malaperis en arbaro kiam ni estis ankoraŭ fore.

- Kaj la virinoj?
- Ni kaptis ilin en la kuirejo. Laŭŝajne, ili ne sciis, ke li estas partizano.

- Ne kredu fabelojn!
Sekvis momento de silento, poste Vrabec denove demandis:

- Kion vi eksciis?
- Preskaŭ nenion.
- Ĉu vi ne ektiklis lin?
- La aĝa preskaŭ ne spiras, ŝi svenis kelkfoje.
- Prenu ŝin diablo! Kaj la dua?
- Ĵus Spach diskutas kun ŝi.

Vrabec denove silentis kelkan tempon, trarigardante iujn paperojn prenitajn de sur la tablo. Ĵetinte ilin reen, li diris malkontente:

- Ni entute ceremonias kun tiu bando! Ni perdas tempon por transporto, esplorado, anstataŭ likvidi ilin surloke.

Neniu diris ion ajn, do sekvis denova silento dum kiu ri-petiĝis obtuza, ŝira krio, sed ĉi-foje jam neniu reagis je ĝi. Vrabec trarigardis pluajn paperojn, kaj la tri gestapanoj sidis senparole ĉe l'tablo, kvazaŭ atendante ion.

Post ĉirkaŭ kvaronhoro la pordo malfermiĝis kaj venis viro, kies ruĝa vizaĝo montris eksciton kaj koleron. Li rimarkis Vrabec kaj streĉis sian korpon salute, poste diris duone al Vrabec, duone al la tri viroj:

- Sakrita hundino! Ne valoris venigi ŝin ĉi tien.
- Ĉu vi nenion eltiris? - demandis unu el la viroj.
- Ŝajnas, ke ŝi vere nenion scias.
- Kaj la partizano?
- Li eniris la domon simulante arbaran laboriston.
- Kion li volis?
- Nur bandaĝon por kunulo vundinta sin per hakilo.
- Ĉu ili donis?
- Ili ne havis, do petis lin sidiĝi, kaj la pli aĝa iris alian ĉambron por preni pecon da tolo. Dume li petis ion por trin-

ki, la juna donis acidan lakton.

- Kiel li forkuris? - demandis Vrabec.

- Verŝajne li atente rigardis fenestron, ĉar iumomente li fulme ekstaris kaj elkuris eksteren sen iu ajn vorto.

Kelkan tempon Spach staris senparole, poste demandis:

- Ĉu provi ankoraŭfoje?

- Por kio? - Vrabec ruĝiĝis kolere - Por ke vi ankoraŭfoje aŭdu, ke ŝi nenion scias?

- Fini?

- Jes. - ĵetis Vrabec seke kaj denove prenis iujn paperojn, montrante per tio, ke la aferon li opinias finita.

Spach prenis ĉapelon de hoko kaj turnis sin al la tri viroj ĉe l' tablo:

- Iru iu kun mi.

Ili rigardis al Vrabec kiu, ne levante la kapon de super la skribtablo, diris kurte:

- Lincke, vi iru.

La viro leviĝis, prenis zonon kaj revolveron kaj fiksis ĝin ĉirkaŭ sia talio, poste prenis ĉapelon kaj kun Spach eliris el la ĉambro. La ceteraj restis sur siaj lokoj, trankvilaj, indiferentaj, neniom impresitaj de la evento, kiu certe apartenis al ilia ĉiutageco, nur post kelkaj minutoj Vrabec leviĝis kaj aliris fenestron. Kiam li ekvidis la grupeton, li - kvieta pri plenumo de la ordono - ekemis reveni al sia loko, sed subite li senmoviĝis, proksimiĝis la vizaĝon al la vitro kaj kun kreskanta streĉo observis la du virinojn. Ili iris senkatene antaŭ la gestapanoj. La aĝa apenaŭ trenis sin; je kelkaj paŝoj ŝi montris emon eklanti, kvazaŭ io malhelpus ŝin spiri, sed tuj ekiris pluen, sentante paŝojn post si. La juna iris apude kaj ŝia supra korpoparto konvulsiis pro despera plorego.

Vrabec, observante ilin fikse, turnita dorse al la du viroj en la ĉambro, sentis abundan ŝviton aperanta sur la korpo. La polmoj fariĝis humidaj. Malgraŭ neplena helo li rekonis la du virinojn, unu portis robon, kiun li iam aĉetis por ŝi. Liaj patrino kaj edzino iris trans la rivereton!

Li staris senmove ĉe l'fenestro, tute regate de interna tempesto de sentoj. Ĉu elkuri kaj haltigi ilin? Sed tiam ĉiuj ekscios! Kial, je mil diabloj, ili miksiĝis en tian aferon? Ili

kulpas mem! Sed ja post kelkaj minutoj ili ne plu vivos! Kaj senkulpe, ja ili povis ne scii! *Donnerwetter!* Kion fari?

Li sentis, ke lia ĉemizo estas malseka; la polmoj tremetis nerveze, sed li ne sukcesis decidi je iu ajn ago, je iu ajn movo. Dume la grupeto ekstere atingis la surbordatan arbustaron. La virinoj ekhezitis kaj haltis, kvazaŭ iliajn cerbojn trakuris lasta, espera penso pri savo, sed tuj ekrapidis pluen, brutale puŝegite de la gestapanoj, kaj la tuta grupo malaperis en la arbustoj.

En la ĉambro nenio ŝanĝiĝis. La du viroj sidis kviete ĉe la tablo, Vrabec staris ĉe l'fenestro, ĝis nun farinte ne unu movon. Intensa pensado absorbis lin tiom ke li preskaŭ forgesis pri la du viroj ĉe la tablo. Post kelka tempo li elprenis cigaredojn kaj avide ekfumis. Volante demeti la estingitan alumeton, li turniĝis al la skribtablo kaj tiam li ekrigardis la du kunulojn. Senvorte li forlasis la ĉambron, descendis sur la ŝtuparo, haltis malsupre en la koridoro kaj tie fumis avidege, plene absorbata de alternaj sentoj. Tie, starantan ĉe malfermita pordo, atingis lin foraj sonoj de pafoj. ■

"FINANZMINISTER" *

*Wien, Wien nur du allein
sollst stets die Stadt meiner Träume sein.***

Lante, promene mi paŝis laŭ negranda, malluma strato viena, kiam atingis min komence softa sed je ĉiu paŝo pli kaj pli klara agrabla melodio de malnova kanzono. Post kelka tempo mi proksimiĝis al la fonto de l'muziko: en nevasta ĝardena restoracieto, sub arboj ĉarme lumigataj per malnovstilaj lanternoj amuziĝis homoj. Mi haltis diskrete ĉe la fera barilo kaj observis. Laŭ ludo de tripersona Schrammel-kapelo ĉiuj kantis gaje, ĝoje, multaj balanciĝis per la korpo jen dekstren jen maldekstren konforme al la malrapida, rava muziko. Kvankam sur la tabloj staris multaj boteloj, mi ne rimarkis iun ebrian, nur ĉe unu tablo la societo estis iom pli laŭta, kaj eble ĝuste pro tio ĝi altiris la atenton pli ol la ceteraj: ĉirkaŭ eta tablo du paroj amuziĝis plengaje, jam influitaj de la ĉarma viena muziko kaj ankaŭ per la ora likvaĵo, kiu antaŭ nelonge ankoraŭ troviĝis en la boteloj.

Dum mi tiel observis ilin, jam-jam ekironta plu, io frapis mian memoron. Je diablo, mi ja konas tiun vizaĝon! Mi vidis ĝin ie!

Pli atenta ekrigardo al unu el la du viroj - kaj jen klariĝas la nebula paseo. Mi rekonas lin! Estas viro, kun kiu mi amike ludadis en mia infanaĝo. Kolego, amiko el la etknaba tempo. "*Finanzminister*" - kiel oni nomis lin pli poste, kiam li fariĝis plenkreska kaj aktivigis siajn eksterordinarajn kapablojn donontajn al li la sopiratan riĉecon. Sed donontajn kiam? Tion neniu scias ĝis nun.

Mi ekiris pluen kaj la mallumo kaŝis iom ironian rideton vagantan sur mia buŝo, dum mi rememoris la humuran sorton de tiu spritulo.

Henriko Pasero devenis el vilaĝo. Lia patro, malgranda, ruĝvizaĝa vilaĝa gastejisto, estis vera deponejo de ĉiuj lokaj

* Ministro pri financoj. Ĉi tie ŝerce uzita kromnomo.

** Vieno, Vieno, nur vi sola estas urbo de miaj songoj...

novaĵoj. La vilaĝanoj, la servistaro de la grandbieno, de tempo al tempo eĉ ties posedanto, la laboristoj okupataj en fabrikoj de la proksima urbeto sed loĝantaj en la vilaĝo - ĉio vespere, precipe dimanĉe, koncentriĝis en la gastejo, kaj el la zumo de interparoloj, ebrifulaj ekkrioj, rakontadoj, kvereloj, amikaj interkonfeso k.t.p., la mastro scipovis aŭskulti ĉion interesan kaj bezonan. Se li ne ĉion aŭdis, li klopodis sprite eligi; se tio ne eblis, li penis diveni - plej ofte trafe - kaj tiamaniere li fariĝis ĉiosciulo. Vilaĝa, ĝenerale ŝatata sed tiam-iam ankaŭ timata, ĉar konanta tro multajn sekretojn.

Li havis ankaŭ siajn proprajn. Ekzemple, per ia magia povo li kapablis kaŭzi ke la grandbienaj kaj eĉ la kamparanaj servistoj fordrinkis pli ol ili gajnis salajre. Eble pro tio li, kvankam havante multan kortan birdaron kaj nenium agron, neniam aĉetadis grenon. Oni malofte vidis lian edzinon en viandejo, sed malgraŭ tio la gasteja subtegmentejo abundis je fumajita lardo. Laŭ la sama pensmaniero, en tia etoso edukiĝis ankaŭ liaj du filoj, ne mirinde do, ke por tiuj kvar homoj la plej supera valoro estis la mono, kaj ili formiĝis je familio malgranda sed kohera, vulpeska, avide ĉasanta ĉiun okazon promesantan ion gajni - ĉu per ruzo, ĉu per trompo, ĉu per ambaŭ samtempe - kaj heroe decidinta venki ĉiujn malfacilaĵojn per kiuj la homaro - envie kontraŭa je geniaj mensoj - baras la vojon al ĉiu pli granda atingo.

Pasero, sprite mastrumante en la gastejo, certe akirus tie kontentigan havaĵon, se ne malhelpus tion la kaprica historio. Jen la habsburga imperio kliniĝis al sia fino, oni tiam-iam flustris pri milito, do en tiel necerta tempo necesis ekpensi pri sekurigo de la ŝparita mono. Post longaj konsideroj kaj interkonsilado kun konfidataj Hebreoj, Paseroj aĉetis en proksima urbo domon kun ampleksa ĝardeno kaj tiu ago montriĝis tre prudenta. La milito vere eksplodis post kelkaj monatoj kaj tuj decide influis la vivon en la vilaĝo. Por la gastejo la prospera tempo pasis. Ekmankis viroj, kaj tiuj, kiuj restis, ĉiun groŝon dekfoje rigardis antaŭ ol elspezi ĝin. La vivo kvazaŭ eklantis kaj fluis malvigle, necerte, ĉiuj atendis la venkon de la imperiestro kaj la finon de la milito. La fino venis sed la venko ne.

La situacio en la restarigita Pollando ekevoluis laŭ tute

ne atendita vojo. Baldaŭ la grandbieno estis parceligita, la brandfarejo likvidita kaj la gastejo, kiel ŝtata propraĵo, anoncita por vendo. Pasero ne emis aĉeti ĝin, ĉar etiĝis la gajno kaj nenio aŭguris rean prosperon, kaj cetere li eĉ ne havis monon. Ĉiuj ŝparitaĵoj perdiĝis pro inflacio.

Li forlasis la gastejon kaj transloĝiĝis en sian domon al la urbo, kaj tiamaniere mi, loĝanta proksime ĉe la sama strato, ricevis novajn kolegojn por ludado: Henrikon kaj Karlon.

Baldaŭ la familio Paseroj fariĝis konata inter la najbaroj kaj en la ĉirkaŭaĵo. La patro ne laboris, ankaŭ ne la patrino, kaj kiam post kelka tempo aperis en la domo frato de la mastrino, ankaŭ li restadis senlabora. La najbaroj ofte ripetadis: "Per kio tiuj homoj vivtenas sin?", kaj ili baldaŭ trovis respondon je tiu demando.

Pasero ne plu revenis al sia gastejista profesio; en la urbo li kontaktiĝis kun diversaj spekulantoj, brokantantoj kaj sprituloj kaj mem ekpraktikis tiun "profesion". Krome, en budo konstruita en la korto li aranĝis metiejon por ĉio, precipe por seruraĵoj, ĉar tiun metion li iomete konis. De tempo al tempo oni povis vidi lin portantan en aŭ el la urbo diversajn aĵojn: biciklon, viandkaĉigilon, potojn, grandan horloĝon k.t.p., tamen plej volonte li komercadis per kudromaŝinoj. Li aĉetadis malnovajn aŭ difektitajn, riparis ilin kaj vendis ree, kompreneble kun gajno.

Mi memoras, ke eĉ de mia patrino li aĉetis tian maŝinon. Ĝi estis bonfirmaa sed malgraŭ tio nenivalora. Plej verŝajne ĝi havis ian dekomencon difekton, kaj pro tio staris multajn jarojn neuzata, kvankam multfoje ni riparigis ĝin. Post ĉiu riparo ĝi kudris kelkan tempon, por baldaŭ denove difektiĝi, do poste ni lasis ĝin en angulo.

Kiam foje dum ludado mi aludis al Henriko kaj Karlo pri tiu maŝino, ili certe ripetis tion hejme, ĉar preskaŭ tuj ilia patro venis al nia domo kaj demandis, ĉu ni hazarde havas maŝinon por vendi. Mia patrino avertis lin, ke tiu maŝino nemulte valoras, sed tio ne malemigrigis lin ĉar li plu altrudadis la aĉeton, eĉ mem proponante sumon, kiun mia patrino neniam kuraĝus proponi. Efektive, li pagis kaj forportis la maŝinon hejmen. Ni poste eksciis, ke li riparigis ĝin (same kiel la antaŭaj riparintoj) kaj vendis al familio ĵus migronta al

Ĉeĥoslovakio. Oni povas imagi, kiel la nova posedantino malbenis la friponon, kiam ŝi povis nek kudri nek redoni la maŝinon.

Laŭ la familiestro modliĝis la tuta familio kune kun la plene al ĝi konvena nove veninta "oĉjo" Adolfo. Ĝuste li enkondukis la du knabojn en la praktikon de senpena mongajnado.

Trans la strato, proksime al ilia domo loĝis maljuna vidvino. Kompatinda strangulino, iom nenormala mense, firme kredanta je fantomoj, ŝi ĉiam timis imagatajn malamikojn atencantajn kontraŭ ŝia vivo. La loĝejo, kiun ŝi okupis en sia propra, heredita domo, similis sorĉistinejon. Ĉar ŝi vivtenis sin per kulturado de kuracherboj, la tutaj du ĉambroj estis plenaj de ili, kaj la aeron en la domo saturis specifa odormiksaĵo de kuraca herbaro. Ĉiam timante ion, la vidvino farigis interne lignajn kovrilojn por la fenestroj. Dum noktoj ili estis fermitaj, sed ankaŭ por la tagoj ŝi ne tute malfermis ilin, faris nur mallarĝajn fendojn. Tiamaniere la loĝejo preskaŭ ĉiam restis malluma, kio ankoraŭ pli efikis je la mizera virino.

Sciante tion, oĉjo Adolfo ellaboris diablan planon. Li konvinkis la oldulinon, ke ŝi dungu viron kiu gardos ŝin nokte; nu, ekzemple li mem povus tion fari ĉar li provizore estas senlabora kaj povas rekompence dormi dumtage.

La timema virino tuj konsentis, do baldaŭ komenciĝis la gardado. Adolfo ĉiuvespere venadis en ŝian loĝejon kaj vestita lokis sin sur âca kanapo en la kuirejo, metinte apude dikan apogbastonon. Ĉirkaŭ la noktomezo komenciĝadis la ofensivo de la fantomoj, kiuj ekde la nokto kiam Adolfo komencis la gardadon atakis pli forte ol iam ajn antaŭe. Io skrapis kaj frapis je la vitroj, de tempo al tempo fulmrapide ek- kaj malaperis blanka tuko aŭ io simila al homa kapo. En tiaj momentoj Adolfo kuraĝe enkuris la dormejon kaj kun bastono en la mano proksimiĝis al la fenestroj. Tian kuraĝulon ektimis la malbonaj spiritoj kaj ili iome trankviliĝis. Sed ne por longe. Baldaŭ la atako ripetiĝis. Tiam la brava gardanto, ripetante al la tremanta maljunulino, ke nenio okazos al ŝi dum li estas ŝin defendanta, kuraĝe elkuris el la loĝejo por peli la fantomojn. Kaj, efektive, li venkis. Post

minacaj krioj kaj ekstera bruo ĉio kvietigis por la tuta nokto. La virino iom post iom trankviliĝis, oĉjo Adolfo, reveninte laca, kuŝiĝis kaj ekdormis profunde. Kompreneble, la fantomoj estis Karlo kaj Henriko. Tiamaniere tiuj friponoj suĉis monon de la frenezeta kompatindulino.

Post praktikado ĉe tiaj majstroj, kiel la paĉjo kaj la oĉjo, ankaŭ la du knaboj, nun jam adoleskantoj, kapablis entrepreni admirindajn agojn. Sed okupiĝi pri fantomoj kaj maljunaj strangulinoj ili opiniis neinda, eĉ ofenda, por ili la destino preparis pli helan sorton, kaj renkonte al ĝi ili startis kune.

La fakto, ke la urbo situis ĉe la pola-ĉeĥoslovakia limo, disponigis allogajn eblecojn de mongajnado kaj ĝuste tion Henriko kaj Karlo elektis por debuti. La plej konvena loko por kaŝe transpaŝi la limon estis la iom eksterurba akvofalo sur la lima rivero. Densaj arboj kaj arbustoj surkreskis ambaŭ bordojn ĝis la akvo, tiel ke se oni kaŝite trairis la densaĵon, oni estis preskaŭ en la akvo mem. La rivero estis ne malgranda sed ĝia profundo tre variis dum la jaro. Multakva kaj minaca en pluvaj sezonoj, ĝi somere, precipe dum longa sekeco, perdis tre multe da sia akvo, tiel ke preskaŭ tute elakviĝis la ŝtonega fundo kaj la rivero ŝanĝiĝis je multaj etaj torentetoj fluantaj inter rokoj de l'fundo. Oni povis, saltante de unu roko al alia, sekpede trairi la tutan riveron. Karlo kaj Henriko en konvene malhelaj vestoj, ekstreme atente ŝoviĝadis tra la densaĵo al la rivero. Ili lerte spionis la gardiston lante paŝantan laŭ la surborda pado kaj observantan la riveron. La kontrabandaĵon portis ĉiam, alterne, nur unu frato (la trapasonta la limon), la dua nur asekuris. Se la translimiĝanton rimarkus la gardisto, la asekuranto ĵetus sin forkuri. Estis tre versimile, ke la gardistoj, ekaŭdinte bruon en la densaĵo, rezignus postkuri la viron troviĝantan jam preskaŭ sur la ĉeĥa flanko de l'rivero, kaj prefere postkurus "tiujn forkurantajn". Eĉ se la asekuranto estus kaptita, la puno estus tre duba - li ne trapasis la limon, portis neniun kontrabandaĵon, kaj plej ofte li obstine asertis havi nenian ligan kun la kontrabandulo.

Longetan tempon la fratoj sukcese praktikadis tiun mondonan "profesion" sed fine ilia prospero stumblis. La limgardistoj vereble eksciis pri la kontrabando kaj aranĝis em-

buskon. Karlĉjo kaj Henĉjo estis kaptitaj en plej malkonvena momento, kaj kelkan tempon pli poste la loka juĝisto premiis ilian kuraĝon kaj entreprenemon per kondamno je okmonata prizoneco.

Sed batoj de l'sorto kaj survojaj obstakloj rompas nur malfortulojn, fortulojn ili hardas kaj persistemigas. Baldaŭ post la forlaso de la malliberejo la fratoj ekpensis pri nova fonto de mono. Post kelkaj semajnoj ĉe unu el negrandaj stratoj, surmure de malnova domo, la preterpasantoj povis legi novan tabuleton:

Laboragentejo "Integral"

Laborhoroj: ĉiutage inter 9.00 kaj 14.00

La sencon de la vorto "Integral" konis nek la legantoj nek la elpensintoj mem, sed tio ne gravis; ĝi sonis bele, grandmondeske kaj sufiĉe digne por esti traktata serioze, ne mirinde do ke post nelonga tempo al la nova agentejo ekalvenadis laborserĉantoj. Estis plejparte plebanoj: longtempaj senlaboruloj, timemaj servistinoj, kaj simplamensaj knabinoj el malriĉaj multnombraj kamparanaj familioj, kiujn la hejma mizero forpelis en urbon serĉi servon "ĉe sinjoroj".

La agentejo "Integral" interne aspektis multe pli modeste ol tion supozigis la tabulo ekstere. El koridoro oni eniris senpere la unuĉambran oficejon, kie akceptis la estro - Henriko. Li sidis serioze trans skribtablo, kun fontplumo enmane, foliumante paperojn. Post kiam alvenis kliento, Henriko levis la vizaĝon, ekrigardis lin oficiale sed afable kaj, kun aktoreska mieno kaj mangesto, invitis sidiĝi.

La klientoj miris, ekvidinte tiel junan oficiston, sed ilia malkvieto baldaŭ malaperis ĉar li montris tre grandan komprenemon por iliaj zorgoj kaj ĉagrenoj, pacience aŭskultis la veojn kaj promesadis "iel helpi". Ĉiu kliento devis pagi la konvenan pagon kaj ricevis kelkajn adresojn, je kiuj li iru por peti pri okupo.

Laŭŝajne ĉio estis en ordo, la tuta afero aspektis laŭleĝa, sed ĝi montriĝis tre nedaŭra, ĉar ĝia aĝo ne atingis eĉ tri monatojn. Iutage en la oficejon venis la posedanto de la domo, en kiu ĝi troviĝis, kaj lia vizaĝo esprimis sentojn kaŭzantajn en Henriko frostotremon. Luante iam la ĉambron Henriko luis ĝin kvazaŭ por si mem kaj eĉ ne per unu vorto

aludis, ke ĝi servos kiel oficejo. La domposedanto loĝis en alia loko, malofte venadis en la urbon, do ne orientiĝis bone en la afero, sed post nelonge li ekkomprenis, ke la nova loĝanto kaŭzos multe da zorgoj. Jam la unuan lupagon li prokrastis kaj fine pagis ĝin nur je persista postulado, la dua kaj la tria tute ne alvenis, do necesis veturi al la juna spritulo kja devigi lin je pago. Sed veninte antaŭ la domon, la posedanto ekmiris: sur la muro blankis la tabulo de "Integral", pri kies ekzisto en sia domo li nenion sciis. Li ascendis la ŝtuparon, haltis antaŭ la oficejo kaj sango ruĝigis lian vizaĝon; li komprenis ke la ĉambro ne servas kiel privata loĝejo. Kaj tiu fripono, gajnante monon, eĉ ne pensas pri pago de l'luo!

Henriko sian tutan kapablon streĉis por moderigi la tondrantan viron:

- Trankviliĝu do, sinjoro Svetý, mi ja pagos al vi ĉion! Havu komprenon, mi ankoraŭ ne havas multan gajnon, sed laŭtempe...

- Ne interesas min via gajno! - ekkriis kolerege la posedanto - vi luprenis la ĉambron, do estas via devo pagi! Kaj krome, laŭ kiu rajto vi aranĝis ĉi tie entreprenon? Mi luis la ĉambron por loĝejo, ne por entrepreno!

- Sed ja estas egala por vi, kion mi faras ĉi tie, nur ke vi ricevu monon...

- Kaj tiun mi ricevas, ĉu? - bojis la viro preskaŭ sufokiĝante pro kolero. - Sed mi donos al vi instruon, atendu nur! Mi postulos sekvestri vian enspezon!

Je la mencio pri interveno de l'aŭtoritato, Henriko eksentis varmon en sia interno kaj li duobligis klopodojn por kvietigi la gaston. Li promesadis pagi ĉion en plej proksima tempo, eĉ antaŭpagi... Sed hodiaŭ, bedaŭrinde... - kaj li elprenis la portfejon*:

- Nu, vidu, sinjoro Svetý, hodiaŭ mi vere ne havas monon, havu iom da pacienco! Mi ja pagos al vi!

La domposedanto ne emis cedi sed li vidis ke neeble estos ricevi la monon hodiaŭ, do li volis almenaŭ timigi la "ĉefon" kaj tiamaniere certigi baldaŭan pagon.

- Tri tagojn mi atendos! - li decidis minace - poste mi plendos ĉe advokato!

* portfejo (neol.): monujo por bankbiletoj.

Post lia foriro Henriko elspiris mildiĝe sed liaj manoj ne tuj ĉesis tremeti.

- Kanajlo sakrinda! - li pensis kolere - kiu diablo gvidis lin ĉi tien? Li sidu ĉe sia virinaĉo kaj maĉu fabon! Nur ke li ne faru al mi ian malagrablaĵon!

Sed ĝuste tiel fariĝis. Svetý antaŭ ol forveturi hejmen vizitis la finanĉan fakon de la urbestro, por demandi, ĉu ekzistas ebleco sekvestri la havaĵon de la agentejo "Integral" en la kazo, se ĝi ne pagus la luprezon. Tamen, la oficisto ekaŭdinte la nomon de la entrepreno ekrigardis mirigite:

- Integral, Integral - li pripensadis - ne, tia agentejo ne ekzistas. Vi eble konfuzas la nomojn?

- Ne, mi ĵus revenas el tie.

- Kiu estas la posedanto? Eble tiel ni trovos.

- Pasero. Henriko Pasero.

La oficisto denove nee movis per la kapo: - Mi ne memoras. Sed atendu iomete, mi esploros mian registrolibron - kaj li ekserĉis en la tirkestoj. Sed vane: inter la nomoj de diversaj entreprenoj estis nek Pasero nek Integral. Nu, kaj tia maniere ĉio venis sub sunan lumon. Svetý, nun eĉ pli maltrankvila, ne volis cedi, la oficisto ekesploris la aferon kaj baldaŭ montriĝis ke la agentejo Integral havas karakteron malleĝalan, ĉar ĝi ne estas laŭleĝe registrita en koncernaj oficejoj.

Se temus nur pri registriĝo, ĉio finiĝus per monpuno, sed evidentiĝis ke Pasero tute simple trompadis siajn klientojn. Li ne havis liberajn postenojn, kaj la serĉantoj, veninte al la indikitaj adresoj, kutime aŭdis ke "provizore tio ne estas aktuala", aŭ "bedaŭrinde, jam okupita", aŭ ion similan. Kompreneble, ĉion preparis anticipe la dua "entreprenisto", Karlo. Li interkonsentis kun siaj gekonatoj kiel ili konduku kaj kion diru, se venos laborserĉantoj. Kaj tio jam estis kontraŭleĝa, do la du fratoj ek troviĝis duafoje antaŭ tribunalo, kaj tiu trovis "okupon" por ili ambaŭ: Karlo "ricevis" du, Henriko kvin monatojn.

Kvin monatoj, parenteze dirante, ne estas longa tempo. En malliberejo la gardistoj eĉ kondukas malpli severe al tiaj signifaj brevtempaj pensiuloj, oni do povas travivi ĉion

sen perdi la mensan ekvilibron kaj kapablon pripensadi la pli prosperan estonton.

Kvankam la oficistado en "Integral" estis okupo agrabla, Henriko - post forlaso de l'prizono - decidis provizore ne entrepreni ion similan. En malgranda urbo mankas spaco bezona por ke altflugemaj birdoj povu etendi siajn flugilojn: ĉiu ĉion scias, observas kaj spionas, por la polico ne estas sekretoj, kaj la oficejoj tuj ekflaras ĉiun entreprenon evitantan imposton. Provizore do necesas kapti ian ajn okupon, ĉar bedaŭrinde oni ankoraŭ ne disdonas senpage manĝaĵojn kaj vestojn, kaj nepras poste ĉirkaŭrigardi pri io pli konvena kaj mondana.

Henriko Pasero akceptis postenon de provizisto en kooperativa metiista entrepreno produktanta mastruman ilaron. Kelkajn monatojn li plenumadis sian devon sen ke la superuloj trovis en ĝi ion riproĉindan, sed poste ree vekigis la malnova inklino: iutage oni konstatis ke la rezervo de la lando estas malpli granda ol devas esti. Per esplorado montriĝis ke la provizisto, transportiganta la ladon de stacidomo al la entreprenaj provizejoj, aranĝis la aferon tiel ke la transportanta aŭtokondukisto "dumvoje perdis" kelkajn ŝarĝaĵojn. La sekvo de tiuj ideo kaj faro estis denova, tria laŭvice, deviga vizito en la juĝejo kaj poste dumonata restado en gardata "izolatejo".

La trifoja fiasko agordigis Henrikon iom malfavore al la loka tereno de l'agado kaj al ties loĝantoj ne kapablaj kompreni la veran genion kaj sciantaj nur ĵetadi envie ŝtonojn antaŭ la piedojn de l'proksimuloj. Li decidis ŝanĝi la agadojn kaj ĝuste ekdisponis sin favora okazo por tio: Pollando estis invadita fare de Germanoj. En centraj partoj de Pollando ili organizis la tiel nomatan *Generalgouvernement*, kaj ĝin elektis nia heroo por laŭvicaj, nun jam certaj sukcesoj.

Bedaŭrinde, mi ne konas bone lian tiean agadon. Devige sendite, ĉar Polo, al laboro en malproksiman parton de la lando - mi preskaŭ perdis kontakton kun mia hejmo kaj ne atingadis min novaĵoj el tiu tereno. Nur post la milito oni rakontis ĉion al mi.

Henriko Pasero, konante la germanan lingvon kiun li el-lernis estante iam kelnero en restoracio vizitata plejparte

de Germanoj, deklaris sin Germano maljuste traktita kaj persekutita en Pollando, per tio gajnis favoron de la okupaciantoj kaj, sekve, baldaŭ surpaŝis vojon laŭ kiu iris iam lia patro. Li ekkomercis per mono, juvelŝtonoj, oro k.t.p. kaj en breva tempo akiris multan monon. La milito estis tre konvena tempo por tiuspeca agado. Nesufiĉa zorgado pri la ekonomia stato de la pola popolo devis neeviteble kaŭzi ke Poloj ekzorgu pri si mem per ĉiuj eblaj rimedoj. Ekfloris sekrete mallegala produktado kaj komerco.

Post kelka tempo Henriko revenis al sia hejmo. Lia patrino rakontis al najbaroj ke li devis "tie" peze labori, difektis la sanon kaj nun devas kelkajn monatojn restadi hejme kaj kuraci sin.

Bedaŭru, ke vi ne povis vidadi lin en tiu tempo. Elegante vestita, kondutanta eĉ pli sinjorece ol dum li estis direktoro de "Integral", parfume priverŝita, li forlasadis la hejmon posttagmeze por pasigi la vesperon en restoracio. Li regis en ŝocieto, mendadis multekostajn trinkaĵojn, pagis al la orkestro por ke ĝi ludu liajn ŝatatajn muzikaĵojn, kaj rakontis pri la graveco de siaj posteno kaj pozicio "tie" en Varsovio.

- Ni gajnas multe - li rakontis - sed ni ankaŭ peze laboras en danĝero. Tiu pola bando postulas esti forte tenata je la buŝaĉo!

Ne mirinde do, ke li akiris rekonon kaj admiron de la loka Germanaro, kaj unu el tiuj trompitoj peze pagis pro sia sensaĝa kredemo. Estis riĉa farmaciisto, posedanta grandan propran apotekon kaj, krome, belan filinon. Ŝin kaptis la okuloj de Henriko kaj, ravite de ŝia belo, li decidis ke estas jam plej konvena tempo por edziĝi.

Nur unu fojon, restante tiam hejme pro libertempo, mi vidis lin veturantan al sia fianĉino. En luksa kaleŝo (ĝis nun ni ne scias el kie li prenis ĝin), vestite per ekstreme eleganta, bela vesto, kun pajla ĉapelo surkape li veturis laŭ la strato, rigardante jen dekstren jen maldekstren. La veturilon tiris du cindrokoloraj ĉevaloj kaj la veturilisto havis malhelan veston kun brilantaj metalaj butonoj.

Kelkajn semajnojn poste okazis la nupto kaj ankoraŭ preskaŭ duonjaron la feliĉa bopatro kredis, ke doninte la filinon al riĉa komercisto li sekurigis ŝian estontecon.

Sed la bombo devis iam eksplodi kaj ĝi fakte eksplodis. Post ses mielaj monatoj, pasigitaj plejparte je kostoj de la bopatro, la novedzo decidis reveni al sia "entrepreno". Li arde rifuzis preni la edzinon kun si "ĉar estus krimo liaflanke konduki ŝin en la landon de malamiko kie nun, dummilite, eĉ ŝia vivo estus minacata. Post la venko - certe, sed nun ne!

Renkontante tiel fortan kontraŭstaron, ŝi fine cedis, plena de admiro por la edzo, kiu tiel brave kontribuas al kreo de "nova ordo" sur la akiritaj terenoj.

Post la forveturo ŝi regule ricevadis leterojn plenajn de arda amo kaj sopiro, sed post kelka tempo ili subite ĉesis alvenadi. Ŝi atendis, poste maltrankvilis, poste ekmalesperis. La patro intervenis ĉe la polico kaj jen li ricevis klarigon kiu preskaŭ mortigis lin: lia bofilo, nenia komercisto sed ordinara brokantisto, spritulo kaj trompisto, estas arestita kune kun sia frato, kaj pro malpermesita komercaĉado per mono, oraĵoj, juveloj, nutraĵoj k.t.p. ili ambaŭ estis senditaj al koncentrejo. Oni apenaŭ povas imagi, kio fariĝis en la domo de la apotekisto. Tia bato, tia falo de revoj kaj esperoj! Kaj kia honto antaŭ la gekonatoj! Dio kompatema!

Sed, koncerne dion, la afero ne estis simpla. La nupto okazis laŭ la katolika rito kaj en tiu eklezio ne ekzistas eksedziĝo. Post komenca veado la patro eksakris, ne malpli la filino mem, kiu, cetere, konsenton je la edziniĝo donis ne pro amo, sed por jam fine ĉesigi sian fraŭlinecon kaj akiri pozicion de riĉa komercistedzino. Kaj nun kion? Eksedzino ĝis la morto? *Donnerwetter!* Neniam! Mil diabloj prenu tiun friponon!

Kaj dume la fripono vere estis en koncentrejo. La bruta traktado, malsato kaj pezega laboro malfortigis kaj difektis lian sanon, li pli similis fantomon ol vivulon, sed li ĝisvivis la liberiĝon.

Post kiam malaperis la Germanoj, Henriko pripensadis, kiel nun aranĝi sian vivon. La situacio ne estis ĝojiga ĉar ĉiumomente oni povus kulpigi lin pri kunlaboro kun la okupaciintoj, sed li decidis riski: li revenis Varsovion. Tie en la kaoso de la novaranĝata vivo neniu memoris detale lian kon-

duton, kaj se hazarde iu suspekto rigardis, Henriko ekrakontis pri la koncentroj kaj montris la prizonan numeron sur la mano.

Dum tiu postmilita tempo en Pollando baraktis du kontraŭaj fortoj: la antaŭmilita, kapitalisma, kaj la nova - la socialisma. Konforme al tio apud nove organizitaj ŝtataj entreprenoj funkciis ankoraŭ multaj privataj. Ĉirkaŭrigardinte en la medio kaj esplorinte la situacion, Henriko faris senhezitan decidon: la tempo maturas por entrepreni ion! Kaj, apoge je siaj antaŭaj spertoj, li entreprenis.

La unuan de septembro 1945 ĉe la strato de Ribelintoj ekfunkciis nova firmao:

"Continental"

Entrepreno por komerco kun Persujo

H. Pasero k. &

Je granda bedaŭro - same mia kiel certe ankaŭ via, kara leganto - ne eblis akiri detalajn informojn pri tiu nova altenflugo de Paseroj. Mi scias nur ke en "Continental" oficis du personoj: en la unua ĉambro la ĉefo - Karlo, en la dua la direktoro - Henriko. Kion fakte faris kaj kiel prosperis la entrepreno, por publiko restos sekreto. Ĉiuokaze, ĝi ne funkciis longe, ĉar jam dum Pasko ambaŭ fratoj revenis al la gepatra hejmo. Ili fuĝis el Varsovio por eviti multajn, trompigitajn kreditorojn kaj la akuzon. Sed ankaŭ la hejma urbo estis danĝera, ja multaj homoj memoris la okupacion kaj, krome, (je infero!) ne malproksime loĝis la forlasita edzino kun la gepatroj.*

Rapide la fratoj serĉis novan loĝlokon. Karlo dungis sin kiel kelnero en proksima kuraĉloko, Henriko fariĝis proviza oficisto en hospitalo. Li akceptis tiun "aĉan" malnoblan laboron, ĉar li esperis ĉe l'okazo ripari sian ne tre bonan santon.

Sed la inklino pelas vulpon en arbaron! Post kelka tempo

* Efektive, ili ne plu loĝis tie. Ĉar Germanoj, ili fine de la milito translokiĝis al Vieno, sed tiam Henriko ankoraŭ ne sciis tion.

kontrolo en la hospitalo rimarkis ke la stoko de la lastatempe aĉetitaj tolaĵoj tute ne adekvatas al tiu sur la fakturoj. La diferencon povus klarigi sinjoro Pasero, sed, jen montriĝis ke li forestas. Atendi la esploradon, por ke iu demandu pri la okupacio, aŭ pri io simila? Haha!

Eĉ la milico, post kiam oni raportis al ĝi, ne sukcesis trovi la hospitalan proviziston. Ja tiu, ekklarinte la minacon, saĝa per siaj antaŭaj spertoj, ne atendis la klarigon kaj ties sekvojn sed forte streĉis sian spritecon por eskapi el la danĝero.

Li havis onklinon en Germanujo. Ankoraŭ dum la unua mondmilito, estante juna knabino, ŝi vekis interesiĝon kaj amon en soldato aŭstria, kaj tiu tiel persiste petis la gepatrojn, ke ili fine cedis kaj konsentis doni al li sian filinon. Tiam neniu pensis pri falo de Aŭstrio, en simpla popolo la fido je l'imperiestro estis senlima. Post disfalo de Aŭstrio la juna paro iel ek troviĝis en Germanujo kaj lokiĝis en kampara mastrumo. Tiam preskaŭ tute ĉesis la kontaktoj kun la familio, nur malofte, okaze de Pasko aŭ Pentekosto, oni interŝanĝis bondezirajn kartojn aŭ leterojn.

Nun, post pli ol tridek jaroj, en danĝera situacio Henriko rememoris pri la "onklinjo". Kiamaniere li transpasis la limon (fakte eĉ du limojn), restos sekreto, estas sciata nur, ke li iutage aperis en la mastrumo de l'geonkloj, alportante al ili "plej korajn salutojn de la tuta familio". Kelkan tempon ili gastigis lin, rakontantan ĉiuvespere fantaziajn rakontojn pri siaj travivaĵoj kaj pri politikaj persekutoj en Pollando, sed poste la geonkloj, simplaj sed ne malruzaj, rimarkis ke ilia familiano montras, tre malkonformajn al la kamparana vivo, mallaŭdindajn emojn al nenifarado, parazitado sed samtempe al bonvivado. Tiu konkludo pli kaj pli fridigis ilian sintenon al la nevo, ĝis fine li ekkomprenis ke fariĝis neevitebla la forlaso de la mastrumo kaj serĉo de iu laboro.

Sed ĉu la direktoro de "Continental" povas labori surkampe? Monstra penso! Al li nur grandurbo kapablas doni tiun fortan apogan bazon kiu estas necesa por emergi el la marĉo de la ĉiutaga griza vivo kaj starti je flugo al novaj sukcesoj. Tiu urbo - decidis Henriko - estos Vieno!

Sed en Vieno - kie li ek troviĝis dank'al monapogo de la

geonkloj - liberaj postenoj kaj laboro ne kuŝas surstrate. Kompanioj por komerco kun Persujo havas neniajn perspektivojn, restoracioj ne bezonas fremdajn kelnerojn, eĉ en hospitaloj oni preferas proprajn aŭstrajn laborantojn.

Sed, mil diablojn! Ĉu en Vieno geniuloj mortu pro malsato? Ne! Henriko Pasero ne mortis. Li trovis savantojn kaj prizorgantojn. Estis monaĥoj. Post kelka tempo oni povis vidi lin - malsanan viktimon de politikaj kaj religiaj persekutoj en Pollando - en monaĥeja hospitalo. Ĉi-foje li vere grave malsanis. La restadoj en malliberejo, en koncentrejo, la maltrankvilado kaj nerva streĉo, necerteco pri la propra sorto - ĉio ĉi forte influis lian staton kaj kaŭzis malsanon de digestaj organoj. Duodenulceroj! - tekstis la kuracista diagnozo. En tia situacio ununura savo estis resti ĉe la monaĥoj, kiuj vere akceptis Henrikon post ties trisemajna restado en hospitalo. Pia, humila rifugiĝo el komunisma lando ekloĝis provizore en domo estanta monaĥeja propraĵo, por pli poste, post resaniĝo, trovi ian konvenan laboron. Lia loĝado tie plilongigis ĝis preskaŭ unu jaro kaj oni devas konfesi ke ĉi-foje Henriko klopodis rekompenci la protekton kaj bonecon de l'monaĥoj. Li faris al ili etajn laborojn, kaj - dank'al sia spriteco - helpis solvi multajn aferojn kaj problemojn, la opinio pri li do estis bona kaj la monaĥoj ne suspektis kun kiu ili rilatas.

Sed li konsciis, ke li ja ne povas resti ĉe la monaĥoj poreterne, iam necesas denove eniri la "indan vivon", kaj ĝuste en la monaĥeja medio li trovis ideon pri tiu vivo. Ideon indan je Henriko Pasero!

Mi, feliĉulo, tiun ideon ekkonis, tamen multe pli poste kaj ne de la heroo mem, nek de la monaĥoj, kiujn li iam forlasis, sed simple el mia urbo, de mia amiko, la urba prokuroro.

Henriko, certe okaze de la kontaktoj kun monaĥoj, iamaniere kontaktiĝis kun aŭstriaj ekleziaj medioj produktantaj religiajn bildetojn. Tiujn bildetojn oni kontrabandis al Pollando, kie ne eblis presi ilin. Inter ili li rimarkis ankaŭ bildeton de (plej adorata en Pollando) sankta Maria el Ĉenstoŝovo. La specifa eco de tiu Maria estas ke ŝi havas tre malhelan vizaĝon, kion oni firme konservas sur ĉiuj reproduktadoj. Tiu fakto sugestis al Henriko genian penson: ŝi estos

nigrula sanktulino! Ĵus la papo nomumis novajn afrikajn episkopojn, eĉ kardinalojn, la katolikismo tie disvolviĝas, kreskas bezono por religiaĵoj!

En kurta tempo Henriko realigis la ideon kaj amaso da bildetoj de nigrula sanktulino forveturis en Afrikon.

Laŭ komerca flanko ĉio estis laŭleĝa, sed la aŭstria prokurejo, al kiu turnis sin la trompitaĵoj vienaj kreditoroj de la pola rifuĝinto Henriko Pasero, opiniis ke ne nur estas delikto prunti monon kaj poste evitadi ties redonon, sed ankaŭ - trompe prezenti la sanktan Marian el Ĉenstovo nigrula sanktulino, kio ŝi neniam estis.

Kia estis la fino de tiu mirinda komerca ideo, mi ne scias. Sed laŭ mia observado pri Henriko en tiu viena agrabla restoracieto, kiun mi menciis ĉe l'komenco, laŭ lia gaja amuziĝo kaj adorado de "vino, virino kaj kanto", laŭ lia eleganta vesto kaj monduma konduto mi rajtas konkludi, ke la iama fantomo, estro de "Integral", grandkomercisto en *General-gouvernement* kaj direktoro de "Continental" - Henriko Pasero retrovis, almenaŭ provizore, plenan korpan, mensan kaj financan ekvilibron. *Audaces fortuna iuvat!* ■

* (lat.): la fortuno helpas kuraĝulojn.

DESTINO

Ĉi tiun historion rakontis maljuna bibliotekisto. Ĉu li prenis ĝin el la vivo, aŭ ĉu trovis en iu el multegaj libroj fluintaj tra liaj manoj, ne sciate. Eble kontribuis ambaŭ fontoj, kaj la tempo, helpe de la febliĝanta memoro, kreis tuton ŝajne homogenan.

El la oldula buŝo fluetis la rakonto, kaj la kapo de temp' al tempo lante balanciĝis kvazaŭ por emfazi la krudecon de la homa sorto.

En Trubov, silezia vilaĝo ĉe la suda ekstremo de Pollando, staris gastejo "Ĉe pikedo". Kiel ofte en vilaĝoj ĝi estis samtempe bieneto, malgranda, "dubovina" - kiel diras kampuloj. Sed eĉ du bovinoj, krom porkoj kaj korta birdaro, postulas multon da laboro. La gastejisto do, plejparte okupata en la gastejo, por la bieneto dungadis servistinojn, kaj ŝin ŝarĝis ĉefe la bienetaj laboroj. Ekde mateno ĝis vespero ŝi devis vigli - nutri la bestojn, la kokinojn, forigi sterkon, sterni pajlon, melki, serpi, pioĉi... Laboris ankaŭ la mastrino, sed la gastejo kaj la kuirejo nutranta ne nur la hejmanojn sed iom ankaŭ la gastojn dispersis ŝian tempon, ne lasante multon al la mastrumado.

"Ĉe pikedo" ne estis kunvenejo de drinkuloj nek vangofrapejo de ebrietaj, adoleskaj kamparanidoj, ĝi preferis servi al seriozaj mastroj, trankvile sorbantaj sian bieron, de temp' al tempo forviŝantaj ŝaŭmon de sur la lipharoj, kaj al gastoj el proksima urbo venantaj promene dum sabataj kaj dimanĉaj posttagmezoj.

Kiam la urba industrio kreskis, ĝi logis homojn el la ĉirkaŭaj vilaĝoj kaj tiam malpli facile troveblis kandidatinoj por servado en bienoj. Ne eblis selekto, la bienistoj devis kontentiĝi per ĉia emulino, sendepende de ŝiaj kvalifikoj. Tiel sur la eventejon venis Elza.

Ŝian familion de najbarvilaĝaj malriĉaj kampuloj regis ĉefe la mizero. Laŭ ĝiaj postuloj la plejparto de la infanoj,

kreskinte super la infanajn jarojn, laŭvice forlasis la hejmon kaj iris "al servo". Elza, kvankam la plej aĝa, longe evitadis tiun sorton, sed nur ĉar neniu volis ŝin dungi. Pro la kriplo. Se oni ŝin rigardis ekde la talio supren, simile kiel reĝinon sur ludkarto, oni vidis tridekjaran virinon kun larĝaj ŝultroj, fortikaj brakoj, nigraj haroj glate kombitaj je nodo sur okcipito, kaj kun vizaĝo ne bela, ne malbela, nu, simila al multaj vizaĝoj en la vilaĝo. Sed ekrigardo pli suben kaŭzis depriman konsternon. Ŝiaj gamboj estis terure torditaj. La femuroj iris eksteren, la tibioj internen, formante angulon, kaj la piedplatoj denove eksteren ekde la maleoloj, la karno estis malglata, kvazaŭ kun internaj buloj, la tuta longo de la gamboj estis duona ol ĝi devus esti. Dum irado ŝi faris paŝojn malgrandajn, necertajn.

La kriplo venis kun la naskiĝo kaj la infano kreskis kun ĝi, adaptiĝante al sia stato. Homoj miris, kompate balancis la kapojn sed silente kondamnis la knabinon je portado de ŝia vivoŝarĝo. Rezigno pri amuzoj de normalaj homoj, rezigno pri la plej arda deziro virina - edziniĝo kaj infano, kaŝado de la kriplaĵoj en malvastaj muroj de la gepatra loĝejo, dolora obsedo de misvaloro - jen kion la vivo portontis al ŝi. Sed, kvazaŭ pro kompato, kvazaŭ por mildigi la amaran konscion, ĝi donis al ŝi karakteron malmolan, rezisteman kaj persisteman. Post multaj jaroj ĝuste tiuj ecoj decidigis ŝin forlasi la hejmon kaj iri al ĉe aliaj homoj.

Ŝi havis jam tridek jarojn, kiam turniĝis la direkto de ŝia vivo. La plej juna frato edziĝis kaj restis hejme, venadis infanoj, la malvastiĝanta loĝejo streĉis la etoson. Eksciinte, ke la gastejisto "Ĉe pikedo" bezonas servistinon, Elza decidis senhezite: se mi povas labori hejme, mi povos ankaŭ tie. Ŝi iris kaj proponis sian servon.

En la unua momento la gegastejistoj gapis surprizite jen ŝin, jen sin reciproke, ne sciante kion respondi. Tian kriplulinon? Kiel ŝi laboros? Ĉu ŝi entute povas ion fari? Sed iom post iom rifuzemon ekapudis hezito: ja mankas servistinoj, se ni rifuzos, ĉu ni trovos alian? Hejme ŝi ankaŭ laboras. Eble ŝi ne postulos grandan pagon, tia mizerulino! Ni povas provi, se ŝi ne taŭgos...

Baldaŭ Elza ektroviĝis en "Ĉe pikedo". Je surprizo, ŝi ka-

kablis plenumadi ĉiujn devojn de servistino, kaj vere ilin plenumadis. La sana organismo, en plena virinjuno, ne sentis ankoraŭ malsanperturbojn, la kutimiĝo labori kaŭzis, ke ŝi ne sentis sin pli ŝargita ol hejme. Se io ŝanĝiĝis, jen nur je pli bona. Estis ioma salajro, estis pli pura loĝejo, pli bonaj manĝaĵoj, la vivo fluis laŭ normala ritmo.

Pasis kvin jaroj. Elza enkreskis la novan medion kaj sentis sin familiare, kontentis la gemastroj ĉar, zorgante pri la bieneto kiel pri sia propra, ŝi preskaŭ nenion postulis nek pretendis. En "Ĉe pikedo" ŝi trovis sian duan hejmon, kaj ŝajnis ke ĝi restos ankaŭ la lasta haveno de ŝia vivo, tamen la destino ankoraŭfoje kurbigis ŝian vojon.

Fojan someran dimanĉon, dum bela posttagmezo, "Ĉe pikedo" plenetis je viroj. Sidis inter ili Ludvik Burava, mastro de eta farmo en najbara vilaĝo, cetere samvilaĝano de Elza. Li konis ŝin, ŝian familion, sciis ke ŝi servistinas en "Ĉe pikedo", konis ŝian kriplon, sed, verdire, tiuj ĉi aferoj nemulte interesis lin, des malpli ke li havis proprajn zorgojn. Antaŭ du jaroj mortis lia edzino kaj li mastrumadis vidve, kun dek-sesjara filino kaj dekjara filo. La knabino, laborema, viglis laŭ siaj eblecoj sed ŝi ankoraŭ ne kapablis anstataŭi mastrinon. En la farmeto ekrimarkeblis neglekto. La vilaĝo flustradis kaŝe: - Tiu Burava ja devus edziĝi. Kvindekjara viro sen virino, farmo sen mastrino, kiu vidis tiaĵon? La knabino ia estas ankoraŭ juna, ĉu ŝi eterne sidos ĉe la patro?

Ĉe tiu-iu okazo oni aludis pri tio al Burava sed li silentis, nek jesante nek neante, kvazaŭ samopiniis sed entreprenis nenion konkretan, ne povante venki hezitemon kaj fari decidan paŝon. Oni flustris, ke li emus edziĝi sed timas ĉu la dua edzino estos bona por la gefiloj.

Sidante en "Ĉe pikedo", Burava parolis nemulte, nur fojtempe aldonadis frazeton al la babilado aŭ ekridis kun la aliaj, sed de temp' al tempo atente observis Elzan, dum ŝi forportantis glasojn, lavis ilin aŭ viŝis tablojn. Tiam li kvazaŭ forgesis pri la interbabilo, rigardis, intermite ion pripensis. Videblis, ke dum tiuj temperoj liaj pensoj forestas en la gastejo.

Iumomente, kiam Elza preterirantis lian tablon, li alparolis ŝin:

- Kio nova ĉe vi ĉi tie?
- Nova? Ne, nenio, laboro abundas, kiel ĉiam...
- Jes, laboro neniam mankas.
- Kaj kiel vi vivas tie?
- Nu, iel ni vivas - respondis Burava sen ĝojo - sed facile ne estas... Vi scias!

Elza momenton silentis, viŝetis tablon kvankam ĝi ne estis malseka, poste diris mallaŭte:

- Estus pli bone se vi edziĝus. Malfacilas mastrumi sen virino.

- Malfacilas. Sed kiu volus iri al vidvo kun infanoj kaj multa laboro?

- Nu, ne diru... Ja certe troviĝus iu...

- Ee... hodiaŭ homoj volas nur malmulte labori kaj multe gajnadi.

- Tio veras. Ĉiu pensas nur pri televidilo, aŭtomobilo, vojaĝoj, sed labori neniu hastas.

- Vi pravas, tiel estas!

La interparolo ĉesis, Elza revenis trans la verŝtablon. Post tiu dimanĉo pasis du semajnoj. Fojan vesperon, dum Elza paŝtis bovinojn sur ĉevoja herbozono, Burava preterirante survoje, deviis al ŝi. Longan tempon ili interparolis, paŝante malrapide laŭ la movo de la bovinoj. Rimarkis ilin la gastejstrino sed ne tre atentis, mem okupate en la korto. Post horo Burava foriris laŭ sia antaŭa vojo.

Denove pasis kelka tempo. Fojan vesperon, dum ĉiuj jam kuŝis en la litoj, la gastejisto diris mallaŭte al la edzino:

- Ci, Eva, kion tiu Burava tiom longe interflustris kun Elza?

- Kun Elza? Kie?

- Nu, trans la garbejo, kiam ŝi paŝtis.

- Trans la garbejo? - en la mastrino subite kreskis interesiĝo. - Denove?

- Kial denove? Ĉu li jam estis tie antaŭe?

- Tie ne, sed sur la herbozono li estiĝis ĉe ŝi kaj ili longe interparolis.

- Kion li volas de ŝi?

- Ĉu mi scias?

- Eble ili nur simple interparolis, ja ili estas samvilaĝanoj.

- Eble.

La gastejisto etan tempon silentis, poste denove ekflustris:

- Sed ankaŭ en la gastejo li parolis kun ŝi. Sur la herbozono, trans la garbejo... hm, ŝajnas iom strange...

- Neniam antaŭe li atentis ŝin.

- Neniam.

Denove sekvis momento da silento.

- Ci, li ja ne pensas...

- Ĉu mi scias? Ĉio eblas, ja tia kvindekjara viro sen virino...

- Estus fiaĵo liaflanke! - indignis la gastejisto - Tian kriplulinon...

- Viroj nenion atentis, se bezonas...

Ili eksilentis, sed sentebelis ke ĉiu estas pripensanta la aferon. Post kelka tempo la gastejisto diris:

- Eble ni eraras. Cetere la afero ja devas iel klariĝi. Ni dormu.

- Prave. Ni dormu.

Sed la afero ne mortis. Proksiman sabaton la gastejistino veturis kun ovoj kaj legomoj al foiro. Vendinte, ŝi eniris la foirejan bufedon kie kutime, post la negocoj, la foiruloj manĝetis kaj trinkis. Ŝi aĉetis sandviĉojn, teon, kaj eksidis ĉe unu el la densaj tabletoj kie jam manĝas multaj virinoj vigle interparolantaj. Nelonge daŭris ĝis ili ensorbis ŝin en sian babiladon. Iumomente unu diris gaje:

- Nu, gastejistino, kiam vi invitas al nupto?

- Al nupto? - ŝi demandis mire - Kia nupto?

La virinoj intergvatis kun signifoplenaj ridetoj:

- Nu, ne simulu ke vi nenion scias...

- Sed pri kio vi parolas? - ŝia voĉo jam eksonis nerveze.

- He, homoj jam vaste klaĉas pri tio kaj vi ŝajnigas nenion scii.

- Sed mi vere ne scias.

- Nu, pri Elza.

- Pri Elza?

- Pri Elza. Ŝi edziniĝas al Burava.

La gastejistino eksentis varman sangofluson en la vizaĝo.

La renkontoj de la servistino kun Burava, iliaj sekretaj interparoloj asociiĝis nun kun la bata novaĵo kaj ekscitis ŝin. Tra la menso ekiris vico de timetoj taŭzantaj la trankvilon. Elza forlasos la domon, ĉu troviĝos nova servistino? Kia, kaj kiom ŝi postulos? Se ne, kiu prizorgos la bestojn, la kampon? Ŝi mem, sola, kun tiom da mastrinaj kaj kuirejaj taskoj?

Ŝi fintrinkis la teon kaj rapidis for, por kiel eble plej frue transdoni la novaĵon al la edzo. Oni devas pripensi, kion fari. Oponi? Sed kiel? Diable! Ĉu tiu Burava ne havis aliajn virinojn? Ĝuste Elzan li devis elekti? Kiel ŝi aspektos inter la bienmastrinoj? Kaj kion diros la infanoj de Burava je tia duonpatrino? Ee..., eble ĉio estas nur klaĉo, nova oni-diraĵo!

La gastejisto tuj rimarkis ion neordinaran en la konduto de la edzino.

- Kial vi estas tiel ekscitita? Kio okazis?
- Se mi diros, vi eksidos surplanken.
- Nu? - la viro ekrigardis kun subita maltrankvilo.
- Elza edziniĝas.
- Kion?
- Nu, vi aŭdis ja, Elza edziniĝas.

Li ekridis laŭte, kvankam nesincere.

- Elza? Virino, ĉu vi frezeziĝis? Kiel ŝi povus...
- Mi ne scias, mi scias nur ke ŝi edziniĝas.

La viro silentis. En lia vizaĝo surprizo ŝanĝiĝis je videbla malkontento. Kutimiĝinte dum jaroj al la penso, ke Elza pordaŭre restos ĉe ili, kaj tiel liberiĝinte de la zorgoj pri la bieneto, li nun sentis ke falas sur lin novaj problemoj.

- Kion ni faros nun? - li demandis necertè.
- Ĉu mi scias?

Momenton li silentis, poste diris per kolera voĉo:

- Diabloj prenu tiun Burava! Se li ne... Kio eksplodis en lia kapaĉo? Ĉu malmultas virinoj ĉirkaŭe? Fraŭlinoj, vidvinoj... Ĝuste Elzan li devis elekti!

- Sed ĉu vi povas ordoni al li, kiun elekti?

La viro ne respondis. Kelkaj tempon li silentis, poste diris necerte:

- Ni provu persvadi ŝin...
- Kiel?

- Vi estas virino. Interparolu kun ŝi intime... tiel inter virinoj. Eble ŝi mem hezitas, kaj konsentas nur pro insisto de tiu Burava.

- Mi ne kredas tion. Ŝi ne emus edziniĝi? Kiu virino ne emus?

- Sed en ŝia stato...

- Se al Burava tio ne malhelpas, al ŝi ankaŭ ne.

- Do kion ni faru? - la viro ruĝiĝis kolere.

- Mi ne scias.

Tamen la sekvintan tagon la gastejistino kaptis konvenan momenton por plenumi la sugeston de la edzo. Tagmeze, dum nutro kaj melko de la bovino, ŝi alparolis la servistinon:

- Elza, ĉu vi scias kion oni diras pri vi?

- Nu, kion?

- Ke vi edziniĝas al Burava.

La servistino silentis. Ankaŭ la mastrino kelkan tempon silentis, esperante ekaŭdi ian klarigon, sed, aŭdante nenion, mem demandis:

- Ĉu tio veras?

- Veras.

Sekvis streĉa momento. La servistino, ĉiam obea, nun pretis defendi sian imagatan feliĉon, la mastrino ne sciis kion diri. Fine ŝi alparolis mole, kaŝante la eksciton:

- Kial vi faras tion? Ĉu vi fartis malbone ĉe ni? Ĉiam vi diris ke ĉi tie vi estas kvazaŭ hejme, neniam vi plendis...

- Tiel mi diris ĉar tiel estis, sed se li volas min, certe tia estas la destino.

- Ĉu vi scias, kia laborego atendas vin tie?

- Ĉu ĉi tie mi ne laboras?

- Li havas multe pli da tero kaj brutaro.

- Sed ankaŭ li prizorgas ilin, ne kiel ĉe ni...

La gastejistino englutis la acidan aludpilolon sen reago. La situacio ne permesis reagi bruske.

- Kaj kion diros liaj infanoj, ĉu jam scias?

- Li diris al ili.

- Kaj ili kion?

- Nenion. La filino iomete... - Elza ne finis la frazon. Sentebliis ke la knabino ne kun kontento akceptis la ŝokan decidon de la patro. - Eble ŝi hontas pro mi...

- Ĉu vi ne timas konfliktojn kun tiel granda knabino?
- Li diris ke ŝi kutimiĝos. Cetere, en la hejmo li ordonas, ne ŝi.
- Nu, ne estu tiel certa. Ĉi tio montriĝos pli poste!
- Li ne dirus, se tiel ne estus!
- Li ne ĉion diros al vi. Krome, eĉ li ne scias, kiel ekfluos la intervivo post kiam vi venos tien.
- Ĉu mi intencas fari maljustaĵon al la infanoj?
- Certe ne, sed ĉu ili ne ĵaluzos pri la patro? Ĝis nun li apartenis nur al ili, sed post kiam li edziĝos...
- Estos, kiel estis.
- Dio donu, dio donu...

Kelkan tempon daŭris silento. Elza ne montris emon interparoli ĉar ŝi sentis ke ĉiu mastrina vorto estos atenco kontraŭ ŝia decido, tamen la mastrino ne emis cedi. La endanĝerigita propra intereso stimulis ŝin al pluaj provoj kaj sugestis argumentojn. Post kelka tempo ŝi daŭrigis:

- Kaj ĉu vi pensis pri... nu, pri la geedza intervivo? Vi ja scias ke poste necesos...
- Granda afero! - neglekte refutis la sugeston Elza. - Ĉiuj virinoj intervivas!
- Nu jes, sed... en via stato... - la gastejistino hezitis, ne sciante kiel diri la penson sen piki la obsedan vundon de la servistino.

Sed kripluloj ofte malpli sentas sian kriplon, ol supozas tion aliuloj rigardantaj ilin. Ili kutimiĝas al sia stato, adaptiĝas al la cirkonstancoj kaj, escepte de eksterordinaraj momentoj reliefigantaj la difekton, sentas sin normalaj homoj.

Elza elsentis pri kio temas, sed tio nur plifortigis ŝian rezistemon. Eĉ ne dum momento ŝi ekemis cedi. La interparoloj kun Burava, la komuna planado, ŝiaj propraj revoj kaj deziroj - ĉio jam tiom profunden eniĝis en ŝian konscion, ke eĉ penseton pri alia vivovojo, krom la decidita, ŝi ne emis allasi al si. Ĉiu persvademulo estis malamiko.

- Kial homoj fariĝis tiel zorgemaj pri mi? - ŝi ekparolis per voĉo en kiu miksiĝis kolero kaj timo. - Antaŭe oni apenaŭ rimarkis min, neniun mi interesis, kaj subite ĉiu volas esti mia bona konsilulo. Oni lasu min en trankvilo. Burava konas min delonge, ja ekde mia infanaĝo, li scias kia

mi estas, se li volas min, estas lia afero, ne de homoj. Ili zorgu pri si mem, ne pri aliuloj!

- Elza, ja ne koleru! - mildigis ĉion la mastrino. - Mi ne volas miksiĝi en vian vivon! Sed vi longe loĝas ĉe mi, mi opinias vin preskaŭ familiano, ne estas indiferece por mi, kiel vi fartos poste, ĉu vi ne devos penegi, ĉu oni ne traktos vin malestime...

- Mi ne timas, li ne estas malbona homo!

- Ĉu mi tion diras? Sed en la vivo okazadas diverse, oni devas esti singardema.

- Mi ne timas! - en la voĉo de la servistino ŝvelis kolero. - Cetere, se tiel estos, mi mem kulpos!

Sed ankaŭ en la mastrino la malkontento, ĝis nun kamufilita, kreskis. Ŝi vidis, ke Elza foriros, la gastejo restos sen servistino, ke ĉiuj avertoj vanas; tiu ĉi konscio ekscitis ŝin kaj degeligis la simulan favoremon. Jam sencelis mildvoĉa, patrina persvado.

- Nu, faru kiel vi volas - ŝi diris bruske - sed se vi restos sola, trompita, kun ventro ĝis la nazo, tiam ne venu por helpo. Mi vin avertis!

- Ne timu, mi ne venos! - ĵetis akre Elza, vibrante pro ekscito.

Baldaŭ la afero evoluis el sekreta klaĉaĵo ĝis publika novaĵo, kaŭzante diversajn reagojn. Aĝulinoj mire movetis la kapojn:

- Kio enfalis la cerbon de l'kompatindulino? Li tute blindigis ŝin. Ĉu ŝi ne komprenas ke li prenas ŝin nur por labori? Ja ne pro beleco! Se li edziĝus kun sana, juna virino, ŝi havus postulojn, ŝi volus amuziĝi, nu, kaj liajn infanojn ŝi eble ne favorus, ja certe volus havi proprajn kaj por ili konservi la havaĵon. Elza nenion postulos, tia mizerulino! Ŝi laboregos kaj ankoraŭ estos kontenta ke li ŝin prenis. Kio falis en ŝian cerbon? Dio mia!

Al pli junaj virinoj la kazo estis temo por spicaj ŝercoj.

- Hi, hi, hi... - ili subridis intervorte - kion elektis tiu Burava! Kiel ŝi aspektos sur la lito!

- Ne timu, ili estingos la lumon!

- Aŭ sin bone kovros per kusenego!

- Sed kion li palpos sub tiu kusenego!
- Li serĉos la frukton, ne la tigojn, hi, hi, hi...!

Simile traktis la aferon viroj. Precipe en la gastejo, dum Elza estis helpanta la mastron, ili nun pli ofte observadis ŝin, kaj laŭ iliaj okuloj, laŭ ironiaj ridetoj kaj intergvatoj ŝi divenadis ke ili pensas pri ŝia edziniĝo, ke apenaŭ ŝi malaperos trans la kuireja pordo, ili eksemos piprajn ŝercojn.

Nun ankaŭ Burava ne venadis al "Ĉe pikedo", ĉar li sciis ke direktiĝos al li similaj persvadoj, ŝercoj kaj rido.

Sed jam nek persvadoj nek rikanoj povis haltigi la fluon de l'eventoj. Burava silentis sed persistis en sia decido, eĉ malpli eblis influu Elzan kaj haltigi ŝin sur ŝia ĝisnuna vojo. Ŝi decidis suriri novan, kaj estis surda je ĉiu kontraŭdirekta persvado. La memoro pri la hejma mizero kiu forpelis ŝin servi ĉe fremdaj homoj, la stato de servistino ĉiam trudata obei kaj preti je voko de l'gemastroj, la instinkta virina sopiro je propraj hejmo kaj infanoj, konstruis ŝildon sukcese defendantan kontraŭ ĉiu homa atako. Trabati ĝin povis nek la konscio pri la kriplo, nek la minaco de kvereloj kun la infanoj de Burava, nek la atendanta peniga laboro, eĉ ne la timo ke ŝi estas por Burava nur stranga seksa deziro, efemera kaj ĉesonta tuj kiam li trovos pli konvenan virinon.

Sed la tempo ne inertis. Pasis kelkaj semajnoj kaj la tago de la nupto proksimis. Sciis ĝin, anoncitan en la preĝejo, la tuta vilaĝo.

Fojan vesperon la gastejisto alparolis la edzinon:

- Eva!
- Kion?
- Mi pensas kaj pensas, kaj ŝajnas al mi ke ni ja devus iel helpi Elzan.

La virino, videble kontenta, turnis sin al la edzo:

- Ankaŭ mi jam pripensadis tion, sed mi timis diri.
- Ŝi ja servas ĉe ni tiom da jaroj! El la domo ŝi ricevos nenion...
- Homoj diros ke ni ellasas ŝin ekstrema mizerulino.
- Kiel aspektos tiu nupto se ni ne iros!
- Tuj estos novaj klaĉoj.

- Certe. Ni devas fari ion. Provu paroli kun ŝi.

La sekvintan tagon, la mastrino kaj la servistino longe interparolis en la kuirejo. La gastejisto evitis eniri tien, kaj kiam li fine eniris, li rimarkis ke la okuloj de ambaŭ virinoj ruĝas pro ploro. Post kiam, ferminte la gastejon, la geedzoj restis solaj, la virino diris:

- Nu, kiel bone estas ke ni decidis helpi ŝin!

- Nu?

- Vi eĉ ne imagas, kian rankoron ŝi sentis al ni. Komence ŝi tute ne volis interparoli, nur silentis aŭ duonbuŝe ĵetis vorteton, sed post kiam mi diris ke ni ne ellasos ŝin el nia hejmo kiel mizerulinon, ke ŝi ja devas havi konvenan nupton ĉar meritas tion, ŝi ekploris, kaj tiel ploris, tiel... nu, ŝajnis al mi ke mia koro krevos.

- En vero preskaŭ neniun mi havas en la mondo, - ŝi singultis - en la hejmo nenio krom mizero, je la gefratoj mi ne povas esperi, ja ili havas proprajn familiojn, ĉi tie mi hejmanigis kaj vin mi opiniis miaj duaj gepatroj. Kiam li proponis al mi geedziĝon, mi kredis ke certe tiel volis la destino kaj ke li edzinigos min... pro mia laboro... - la voĉo de la gastejistino ekvibris, ŝi ĉesis paroli kaj per mano viŝis la okulojn. La viro staris apud ŝi servorte.

*
**

Jam antaŭ ol komenciĝis la nupta ceremonio, la preĝejo plenis. En antaŭaj benkoj sidis la parenkaro kaj la gegastejistoj, post ili vilaĝanaro - precipe virinoj kun filinoj. Ĉirkaŭ la benkoj staris knabinoj kaj vilaĝa plebo. La nuptontoj genuis sur genuilo antaŭ la altaro. Elza digne senmovis, atentante neniun. Estis videble ke ŝi preĝas.

En la gapanta amaso cirkulis interflustroj, tie-ie koloj longiĝadis emerge, por ke la scivolemo perdu neniun detalon, sed unu stranga fenomeno estis tuj rimarkebla: nenie videblis moko. La antaŭaj subridetoj, rikanemo kaj ironiaj gvaŭtoj kvazaŭ mortis antaŭ la pordo de l'preĝejo. Scivolemon pli kaj pli apudis kortuŝo.

Post kiam venis la pastro kaj per mansigno invitis la genuantan paron aliri la altaron, Elza trankvile leviĝis kaj, kun

Burava, ekpaŝis antaŭen. Ankoraŭ neniam ŝia kriple estis tiel eksponata al avidaj homaj okuloj, kiel nun. La kruroj, ĉar en silkaj ŝtrumpoj, videblis kvazaŭ nudaj. Sed ili ne plu estis la ĉefa rigardataĵo. Homoj estis jam sataj. Ĉiu nenormalaĵo finfine ĉesas kauzi intereson.

La ĝeneralan atenton altiris la nupta ceremonio mem; kaj ĝi la kriplon de la fianĉino dronigis en tonoj de l'orgeno, homa kanto, edziĝfestaj roboj kaj fraŭlinaj envietoj.

La gefianĉoj genuiĝis sur altara ŝtupo kaj la pastro ekcelebris la riton.

- Ĉu vi propravole, sen devigo, deziras ke... - solene sonis lia voĉo. Ŝajnetis, ke li intence saturas la ceremonion per tiel solena etoso. Eble li celis renversi la abomenan muron, kiun ĉirkaŭ la jen genuanta virino starigis malfavoro kaj mokemo, kaj kiu antaŭ nelonge ekkrevis. En sia nupta prediko li longe parolis pri la laboro - la plej grava faktoro decidanta pri la valoro de l'homo. Nur en ĝi eblas trovi la ĝustan celon de la vivo, fariĝi utila al aliuloj, kontribui al la komuna bono. Komprenis aŭ sentis tion la ĉi tie genuanta virino tre bone, ĉar ŝia tuta vivo estis senĉesa oferado de la propraj fortoj al aliaj homoj. Ŝi mem atingis nenion. Ankaŭ nun ŝi iras ne al ripozo, sed al tiuj, kiuj ŝin bezonas. La bona Dio, kiu vidas en la homajn korojn, donu al ŝi sufiĉajn fortojn, kaj al la nove kreata familio Li donacu la merititajn pacon, sekurecon kaj feliĉon.

En la preĝejo daŭris absoluta silento. La homoj aŭskultis la pastron kaj sentis, kiel li intence batas la antaŭajn aludojn, ŝercojn kaj rikanojn, levante la mizeran kriplulinon el ŝia serva, genua pozicio, daŭrinta multajn jarojn, kaj direktas ŝin en la sferon de la bienmastrinoj, kie nun estos ŝia prava loko. Rajtigis ŝin por tiu nobeligo la tridekjara penado, deca, sen riĉiga profito, kaj la propra vivo - malriĉa, simpla sed honesta.

Ŝi ĉiam forte kredis, ke la nova vivovojo estas decido de la sorto. Ankaŭ nun ŝi plenfide kredis la vortojn de la pastro, tial - kun la edzo - ŝi ekpaŝis firme tra la preĝejo al ties pordego, trans kiu atendis ŝin gratuloj kaj floroj. Kortuŝite sed digne ŝi ridetis al la gratulantoj kaj al sia revata feliĉo. ■

VIDVINA OFERO

La poŝta oficejo plenis je homoj. Ili en- kaj eliradis, staris malpacience antaŭ giĉetoj, skribis ion ĉe tabloj, ĉiu absorbata de siaj propraj aferoj, indiferenta je aliuloj, apenaŭ rimarkanta ilin.

Mi sidis ĉe apudmura tableto, skribis poŝtan mandaton, kaj poste dum kelka tempo vagis rigarde ien ajn. Ĝuste tiam mi rimarkis ŝin - etan, mizeran oldulinon en malnova, foruzita palto, faldozaj ŝtrumpoj kaj misformaj ŝuoj kun duonfrotitaj kalkanumoj. La bereto sur grizaj haroj jam perdis sian nigron kaj havis nuancon de cindro. Kompatinde mizera, kvankam pura, ŝi staris humile ĉe muro kaj kaŝe observis homojn, kvazaŭ serĉante iun. Ĉar mi ankaŭ observis ŝin, miaj okuloj renkontiĝis. Ŝi rigardis timeme sed fikse, necerta kiel mi traktos tion, kaj rimarkinte kompatan favoron, ŝi iom post iom, tre lante, paŝetis direkte al mi.

Nun mi atendis, kio okazos. La virino paŝetis, haltis, denove paŝetis, ĝis ŝi fine troviĝis tri-kvar paŝojn for de mi. Tiam ŝi ekparolis ion duonvoĉe-duonflustre, sed mi ne komprenis la sencon de la vortoj, tial mi movetis nee la ŝultrojn, esprimante tiel nekomprenon. Ŝi alpaŝis ankoraŭ iomete kaj denove flustris ion, samtempe montrante paperojn tenatajn en la mano. Tiam mi demandis mallaŭte:

- Ĉu vi ion deziras? Kion vi bezonas?

La virino pli etendis la manon kaj tiam mi rimarkis ke ŝi tenas poŝtmandaton.

- Kion vi deziras? - mi ripetis.

- Mi petas, sinjoro... ĉu vi bonvolus plenigi al mi ĉi tion? - ŝi montris la tenatan mandaton.

- Ŝi certe ne scipovas skribi - eksparkis en mia kapo kaj mi etendis manon:

- Evidente, mi skribos ĉion al vi. Sidiĝu.

La virino eksidis, kaj mi, preninte la mandaton, direktis al ŝi demandan rigardon:

- Vi devas dikti vian nomon kaj poste la adresaton.

- Jes, mi scias.
- Do bonvolu diri.
- Mi nomatas Margerita Ŝajter.

Mi skribis la nomon sur la mandato kaj poste demandis:

- Kie vi loĝas?

La virino kvazaŭ iomete ekhezitis, poste diris mallaŭte:

- Nu, mi loĝas en oldulinejo.

- Ĉi tie proksime?

- Jes.

Mi konis tiun urban domon, do mi skribis tuj la adreson.

- Kaj nun diru la adresaton.

Anstataŭ dikti, la oldulino donis al mi duonĉifitan papereton: estis uzita poŝtmandato, kun atesto pri pago. Mi rigardis atente kaj tuj ekkonsciis, ke la ĵusa sendo ne estas la unua, supozeble monon tien ŝi sendis ade. La adresato estis monaĥinejo, tamen ĝi situis ne en granda urbo, eĉ ne en meza, sed - diris tion la adreso - ie fore, en kamparo, izolite.

- Ĉu vi konas tiun monaĥinejon?

- Jes - respondis mallaŭte la virino kaj preskaŭ flustris plu: - Ili vivas tie en ega mizero, ĉar oni forprenis de ili la tutan agron.

- Do per kio ili vivtenas sin?

La virino movetis la ŝultrojn, esprimante tiel zorgozan nescion.

- Nu, iomete ili brodas ornatojn, kaj krome... per tio, kion ili ricevas de homoj.

Mi silente skribis la mandaton kaj etendis ĝin al la oldulino. Ŝi prenis ĝin sed anstataŭ danki, ŝi strange ridetis al mi, kvazaŭ ŝi volus peti ion sed ne povis venki heziton.

- Nu, vi devas nun pagi ĉe la giĉeto.

- Jes, sinjoro, sed... - ŝi interrompis hezite.

Mi rigardis demande kaj atende.

- Nu?

- Mi havas ankoraŭ unu - ŝia voĉo apenaŭ aŭdeblis.

- Do donu, mi ja skribos ĝin.

Kun simptomo de mildiĝo ŝi donis la mandaton kaj kun ĝi ankaŭ malnovan mandateron. Mi gvatis al la adresato: estis pastro loĝanta en monaĥinejo de fora, orientpollanda urbeto.

Rimarkinte mian miron, la oldulino klarigis duonflustre:

- Estas maljuna emerita pastro. Li vivas tre mizere ĉe monaĥinoj, ili mem troviĝas en pezaj vivkondiĉoj. De tempo al tempo mi sendas tien iom da mono.

- Nu, sed ĉu sufiĉas via emeritaĵo? Vi ja mem ricevas certe nemulte.

- Nemulte, ses mil zlotojn.

- Sed parton prenas la oldulinejo, ĉu ne?

- Jes, tri mil oni prenas.

- Do el tiuj restantaj tri vi sendas ankoraŭ al la monaĥinoj?

- De tempo al tempo. Sed kredu min, ili vivas tie ege mizere. Post la milito oni forprenis de ili ĉiun proprietaĵon, ili havas nenion krom la domo.

- Do per kio ili vivtenas sin?

- Ili brodas ornatojn. Se estas mendoj.

- Kaj krome?

- Nu, tiel... - ŝi ne sciis, kion respondi - Sed homoj ne lasas ilin pereii...

Mediteme mi skribis la duan mandaton kaj donis ĝin al la oldulino, sed anstataŭ iri al la ĝiĉeto, ŝi jen subite klinis sin al mi, kaptis mian manon kaj volis kisi ĝin.

- Nu kion vi faras! - konsternite, mi elŝiris la manon kontraŭstare, ne sciante kiel konduki. Tia aĝulino kisu mian manon? Ŝi ankaŭ iomete miris ke iu ne emas akcepti pruvon de dankemo, sed ne insistis, nur danke premis miajn manojn kaj lante foriris al la apudĝiĉeta homvico.

Mi pensis rapide, kaj konscienciproĉoj ekpikis min. Dio mia, mi vivas ne riĉe, tamen sen timo je mizero, sed mia kapo ne naskis penson pri simila faro. En preĝejo mi ĉiudimanĉe oferas kutiman kvoton, sed ĉu mi iam ekpensis... Ŝia emeritaĵo egalas al ses mil zlotoj, do al triono de mia salajro, duonon forprenas de ŝi la oldulinejo, restas do nur tri mil, kaj el tiuj tri ŝi ankoraŭ parton sendadas al monaĥinoj kaj al olda pastro. Jen leciono pri karitato: Leciono, kiun hazarde donis simpla, mizera aĝulino el oldulinejo - al intelligentulo kun universitata titolo.

Mediteme revenante hejmen, mi rememoris la simplan, saĝan maksimumon de Romain Rolland: Ju malpli oni posedas, des pli oni estas riĉa! ■

KIEL GROS FARIĜIS BAPTANTO

Komence de la dudeka jarcento vivis en Cieŝin, pollingve Cieszyn, ne granda urbo ĉe la suda ekstremo de la lando, juda veturigisto Jakobo Gros. Loĝante en neglektita, mizera Malgranda Kvartalo, ĉiutage li jungis la ĉevalon al sia plata veturilo kaj veturis proksime al la stacidomo, por tie kun aliaj veturigistoj atendi klientojn. La laboro ne estis profitabunda sed la Judon karakterizis pacienco, laboremo kaj persisto, tial li tamen vivis ne sen gajnoj. Riĉulo li ne estis, sed ankaŭ ne mizerulo, ĉar ĉio kion li havis fontis el diligenta laboro. Per ĝi li kapablis certigi por si modestan, trankvilan krepuskon de sia vivo, se lia hejmo ne likus per mono. Sed, bedaŭrinde, ĝi likis, kaj la fendoj, tra kiuj la mono elfluadis, estis komence unu, pli poste aperis dua: la edzino, post adoleskiĝo, la filino.

Ne eblas diri, ke la Judino neglektis la hejmon. Ŝi zorgis pri ĝi, ankaŭ pri la edzo, sed posedis ekstreme perfektan kapablon elspezi monon. Ne nur por nutraĵoj kaj por la domo, tio ja estus natura, sed el ŝiaj manoj mono fluis je roboj, ĉapeloj, mansaketoj, parfumoj, ŝminkoj kaj similaĵoj, kiuj je la edzo efikis kiel ruĝa tuko je korida* taŭro. Li provis ne donadi monon, sed kiel permanente kontroli limojn de necesaj hejmaj elspezoj?

- Se vi tiel mastrumos, ni fine iros almozi! - grumblis Gros, retenante koleron.

- Se mi mastrumos kiel? - ŝrikis la edzino.- Ĉu mi ne kalkulas ĉiun groŝon?

- Sed viaj bizaraĵoj kaŭzos al mi koratakon!

- Bizaraĵoj? Miajn robojn vi nomas bizaraĵoj!

- Ĉu vi ne povus vestadi vin, kiel aliaj virinoj?

- Kiuj aliaj? - kriis la Judino - Ĉi tiuj simplulinoj ĉirkaŭe? Mi el mia familio?

* korido: batalo de toreadoro kontraŭ taŭro.

- El kia familio?

- Nu, certe pli bona ol la via!

Gros grincis per dentoj, klopodante haltigi emon kapti iun ĉemanaĵon kaj uzi ĝin.

Tiaj disputoj, de tempo al tempo ripetigantaj, fariĝis konstanta ingredienco de ilia hejmo.

La situacio, kvankam irita, iel ne kaŭzis kolapson de la matrimonio*, monatoj kaj jaroj fluis sensanĝe, sed kreskis ankaŭ nova elemento: la filino. Dum ŝi estis ankoraŭ infano, ŝi ne ludis gravan rolon, sed kiam venis la adoleska aĝo, en la patrino duobliĝis emo montri ŝin al la mondo.

Komenciĝis procezo, fojfoje ekscita ĝisvibre, ekipi la junan fraŭlinon je ĉiuj bezonataĵoj por societa vivo. Nun jam duope, la patrino kuradis kun sia "trezoro" de unu vendejo al alia, rigardis, palpis, mezuris, aĉetis. Tiel post ioma tempo en la hejmo troviĝis jam ne unu, sed du preciozulinaj.

Kaj Gros grumblis. Lian precipan koleron provokadis vizitoj en dolĉaĵejoj, post kiuj venis vice je kafejoj.

- Ĉu vi jam tute stultiĝis? Tian ĉi nazmukulinon konduki en kafejon? Kion ŝi havas tie por fari?

- Vi stultiĝas, ne mi - forpafadis lange la edzino. - Ĉu tia ĉi juna, bela knabino sidadu hejme? En nia mizera domo?

- Ĝis nun ĝi estis bona.

- Ĝis nun! Sed estas jam tempo por elkonduki la knabinon inter homojn. Aŭ eble vi volas ke ŝi restu aĝa fraŭlino?

- Ŝi havas ankoraŭ tempon.

- Ne tre, ne tre.

- Sed el kie mi prenu monon je tiaĵoj?

Ĉi tiaj demandoj, cetere nur retorikaj, ankoraŭ neniam trovis respondon. Malgraŭ grumbloj de la veturigisto, la du virinoj, kutime dimanĉan posttagmezon, kvankam ne ĉiam, memkomprene, entreprenis viziton al *Kaffeehaus*, kaj preparoj daŭris ekde post la tagmanĝo. Fantazie frizitaj, ŝminkitaj tiel ke eĉ la patrino aspektis kiel rozkolora pomo, en pimpaj roboj, parfumitaj ebriiĝe, ili paŝis digne laŭ la stratoj, kaŝe gvatante al la preterpaŝantoj, por kapti la impresojn. Memkomprene, en la kafejo oni sciis, kiuj estas la du grafulinoj, sed ja neniuj, precipe la kelneroj, povis montri sian veran

Kaffeehaus germ. kafejo.

* matrimonio (neol.): geedzeco.

opinion. Feliĉe, la homaj pensoj estas nevideblaj.

Kaj Gros grumblis. Dum preparoj por ĉiu laŭvica "ekspedicio" en kafejon, li grumblis, sakretis, kaj je la elirantaj virinoj graŭlis* kiel mordema hundo.

La tempo fluis. Foje, kelkajn tagojn post kafeja dimanĉo la Judino diris al la edzo:

- Donu al mi iom da mono.
- Da mono? Ja antaŭ nelonge mi donis...
- Vi donis, sed ekmanĝis al mi.
- Kion vi faris per la mono? Vi certe denove aĉetis ian

fatrason!

La Judino eksaltis:

- Fatrason? Kiam mi aĉetis fatrason? Nur montru al mi fatrason en ĉi domo!

- La ŝrankoj plenplenas kaj vi senĉese altiras ion hejmen!

- La ŝrankoj plenplenas? Ĉu vi entute scias, kio estas en la ŝrankoj? Ĉu vi interesiĝas pri ni? Vi pensas nur pri viaj okupoj kaj ne tre scias ke ekzistas nia hejmo!

- Sed mizeron vi ne suferas!

- Ĉar mi mem zorgas! Se mi ne memorus pri ni, ni ĉiuj brilus per nudaj pugo!

- Precipe vi kun la filino!

- Jes, ĝuste ni! La mizera knabino hontus eliri el la domo, se mi ne zorgus pri ŝiaj vestoj.

- Nu, vi zorgas! Per mia mono!

- Sileentuu! Silentu kun via eterna mono! Ni devas ja per io vivi kaj ion havi sur la postaĵo!

- Per tiu "io" jam krakas viaj ŝrankoj, kaj la domo aromas kiel parfumejo!

- Ĉesu! Ĉesu jam ĉar mi ne plu eltenos tion!

- Ankaŭ mi ne.

La kverelo daŭris, ĝia temperaturo kreskantis, sed subite la kolerega Judo eksilentis, kvietiĝis, rapide pripensis ion kvazaŭ neatendita penso estus enfluginta lian kapon. Poste li eliris el la ĉambro, revenis, senvorte donis monon al la edzino, kaj denove forlasis la ĉambron sed sur lia vizaĝo vagis ironia, malica rideto.

graŭli : kolere murmuri hundeske.

Pasis ĉirkaŭ tri semajnoj ĝis iutage, laŭ kelkaj detalaj simptomoj, Gros eksupozis ke prepariĝas denova kafejen-iro. Li sekrete observis la du virinojn, simulante nenion rimarki, eĉ ne supozis, kaj vespere, ŝajnigante eliri al sia ĉevalo, li descendis sur la ŝtuparo kaj atente observis la koridoron malsupre, ĉe la doma pordo. La ŝtuparo elsupre malsupren iris runde, spiraleske, kaj infre*, sub la unuaj ŝtupoj, troviĝis malhela angulo, en kiu kolektiĝis diversa fatraso. Gros iris en la stalon, prenis malnovan sitelon, foruzitan, duone forfrotitan vergan balailon, metis ilin en la profundon de la angulo kaj kovris per papera sako restinta post cemento. Poste li trankvile revenis en la loĝejon.

Nun komenciĝis atendado. La edzino, memorante la lastan kverelon, kamuflis la preparojn, sed la sprita Judo ne lasis sin trompi. Simulante absolutan naivecon, li ruze, nerimarkate kaptadis eĉ plej etajn simptomojn, kaj restante sola, kun malicaj sparkoj en la okuloj, pripensis la detalojn de sia ofensivo. Kaj li ĝisatendis.

Fojan tagon, konkludante laŭ kelkaj detaloj, li diris al si mem: morgaŭ! La morgaŭan tagon, Gros forveturis kiel kutime al la stacidomo sed revenis pli frue kaj enstaligis la ĉevalon. Miran rigardon de la edzino li respondis kvazaŭ neglekte:

- Mi devas ankoraŭ iri por prizorgi iom da fojno, ĉar mi nutras jam per restaĵoj.

La Judino pene regis sin por ne montri ekĝojon: nu, tiu avarulo iros al bienisto kaj certe restos tie ĝis vespero. Ni estos liberaj. Eble ni eĉ revenos antaŭ ol li ree aperos hejme.

Tuj post kiam Gros forlasis la loĝejon, komenciĝis febraj preparoj. Ambaŭ virinoj sin lavis, frizis, vestis, ŝminkis kaj parfumis, kaj baldaŭ staris batalpretaj.

Unua eliris la filino, poste la patrino, kiu ankaŭ ŝlosis la loĝejon. Ili descendis lante, atente, ĉar en la ŝtuparejo regis daŭra duonhelo, la lumo penetris nur tra negrandaj vitroj super la doma pordo. Sed kiam la patrino kaptis la anson por malfermi, ŝi rimarkis ke la pordo estas ŝlosita. Kun miro ŝi gvatis sian filinon, sed antaŭ ol ŝi sukcesis diri ion ajn, ŝprucis sur ŝin densa fetoranta likvaĵo. Ŝi ŝrikis terure, preskaŭ samtempe saman tonon eligis la terurita filino. Ambaŭ vir-

inoj, unuamomente ne kapablaj eĉ moviĝi, kriis freneze, kaj tuj klopodis ekforkuri sur la ŝtuparon, sed pro rapido kaj konsterno ili apenaŭ povis fari tion.

Kaj Gros ŝprucis. En unu mano li tenis sitelon duonplenan je fekaĵoj ĉerpitaj el la kloaka kavo, per la dua li tenis stumpon de korta balailo, trempadis ĝin en la sitelon kaj aspergis, kriante:

- Vi grafulinoj! Mi instruos vin disipi mian monon! Mi instruos vin prodigi mian penan laboron, mian ŝvitadon! Mi montros al vi kafejon!

En la duonhela vestibleteto ekfuriozis tempesto, plifortigata per tumulto, vokoj, krioj kaj pli poste ridego de la ceteraj loĝantoj, kiujn la krioj elpelis el iliaj loĝejoj. Ili staris ĉe la balustrado kaj observis la spektaklon. Fine la du Judinoj sukcesis suprenkuri la ŝtuparon kaj kaŝi sin en la loĝejo.

Gros momenton staris senmove, rigardante supren, poste li ekkriis kolere al la kunloĝantoj de l'domo:

- Nu, kial vi gapas tiel! Ĉu vi ne havas proprajn loĝejojn!

Dum ili malaperantis en siajn ĉambrojn, li trankvile forportis la sitelon kaj la balailstumpon en la korton, kiel bona mastro laborilojn post finita laboro. ■

Enhavo

| | |
|----------------------------|----|
| Enkonduke | 3 |
| "Fortuna variabilis" | 5 |
| Pomĉampanoj | 9 |
| Fornoj | 23 |
| Rikolto | 27 |
| "Finanzminister" | 36 |
| Destino | 51 |
| Vidvina ofero | 63 |
| Kiel Gros fariĝis baptanto | 66 |

Kazimierz Szczurek (Kazimjeĵ Ŝĉurek) post matureca ek-
menso en humanisma liceo studis filologion en la Krakova
universitato. Post magistriĝo li instruis dek jarojn en sia
lando pri la polaj lingvo kaj literaturo, sed pro forta politika
premo (fare de la tiama komunisma reĝimo) li rezignis pri
instruado kaj transiris, post postulataj kromaj studoj kaj ek-
menigo, en bibliotekon, kie li laboris ĝis emeritiĝo. Dum
eskaŭ tuta tiu periodo li aktivis ankaŭ kiel publicisto kaj
tradukisto.

Ekde la jaro 1960 li verkadis ankaŭ Esperante kaj pli-
malpli ofte tiu lingvo fariĝis lia ĉefa esprimilo, kvankam paralele
publicistis ankaŭ pollingve.

Ĝis nun li publikigis Esperante (krom multaj nelibroformaj
tekstoj) jenon:

Kazimjeĵ Ŝĉurek, Lina Gabrielli: **Nuancoj** (1980)

Zofja Kossak: **Obseditaj de Dio**. El la pola tradukis kaj
enkondukon verkis Kazimjeĵ Ŝĉurek (1989)

Kazimjeĵ Ŝĉurek: **Homoj, verkoj, ideoj** (1990)

Kazimjeĵ Ŝĉurek: **Penetre tra jarcentoj** (1991)

Kazimjeĵ Tetmajer: **Freneza Faŭno**. El la pola tradukis kaj
enkondukon verkis Kazimjeĵ Ŝĉurek (1993)

Kazimjeĵ Ŝĉurek: **La bibliofilio** (1991)

Kazimjeĵ Ŝĉurek: **Sopiro al puraj fontoj** (1995). Unua,
bibliofila eldono.

Kazimjeĵ Ŝĉurek: **Sopiro al puraj fontoj** (1995). Dua eldono.